Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Oktobro 2001 72-a jaro, n-ro 10 (1156)

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

ISSN 1163.0442 MENSUEL/MONATA

http://www.multimania.com/satesperanto/ * retadreso: satesper@noos.fr**

ALICANTE

75-a kongreso de S.A.T.- ESPERANTO

01-08.07.2002



DEKLARO DE S.A.T.

Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.), eksciante pri la atencoj okazintaj kontraŭ Usono, esprimas sian hororon antaŭ tiuj abomenaj agadoj kaj kondamnas ilin, kvankam SAT ne forgesas, ke de jardekoj, la diversaj usonaj registaroj provokas krimojn en multaj landoj. Tamen, tio neniel pravigis, pravigas aŭ pravigos la murdon de senkulpaj viktimoj. SAT esprimas siajn kondolencojn al usonaj esperantistoj kaj al la familioj de viktimoj.

La SAT-sidejo

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo....

Karaj gekamaradoj,

kiel vi povas konstati, en tiu ĉi numero vi trovas nur la Raporton pri la laborkunsidoj en Nagykanizsa. Lastjare ni ricevis gratulojn pro la aperigo de tiel detala raporto kaj pro tio ni faras same ĉijare. Por loki ĉion sur 14 paĝoj ni devis uzi iom pli malgrandajn literojn kaj ni pardonpetas al tiuj kiuj eventuale iom malbone vidas.

Pro ampleksa kaj detala raporto ni estis devigataj prokrasti la aperigon de diversaj aktualaj informoj kaj artikoloj, kiuj povos aperi nur en la sekvontaj numeroj de Sennaciulo.

Esperante, ke danke al tiu raporto, povos iom vivi la kongreson ĉiuj gekamaradoj, kiuj ne povis partopreni ĝin fizike, mi kamaradece salutas vin ĉiujn.

Via

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj: http://www.multimania.com/satesperanto
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - Y. Peyraut, P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Yves PEYRAUT
Abonnement annuel/jara abono, France: 336 FRF aŭ 51,70 €
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

INFORMO

Pro manko de spaco aperos en la novembra Sennaciulo artikoloj pri la Unua mondkongreso kontraŭ la mortpuno kaj pri la Forumo pri tutmondiĝo en Nagykanizsa.

Korektoj: En la Aŭgust-Septembra numero de Sennaciulo, en la artikolo "Post Ĝenovo, kion?", oni legu en la lasta linio de la 1-a kolumno: "Do kion oni povas opinii pri tiu lasta grupo?", kaj en la 2-a linio de la lasta kolumno: "....la reformistaj sindikatoj bruege silentis..." kaj ne "bonege".

En la artikolo «Defendo de Feliĉuloj» mankas la punkto 4. - Modelo de letero sendota al rusa ambasadoro en via lando. Fakte la modelo estas la punkto 3 sed oni nur devas ŝanĝi jenon:

Sinjoro Ambasadoro
1) Mi estas membro de la organizo SAT
2) aŭ : Nia grupo....
3) aŭ: Nia federacio...
kiu arigas.....

kaj poste sekvas la teksto sendita de Nagykanizsa.

La fotoj en la sama numero estas tre malbelaj. La redakcio klopodas ĉe la presejo por ke tio ne ripetiĝu.

RIFUĜINTOJ EN AŬSTRALIO

La mondaj amaskomunikiloj anoncis la malhoman konduton de la aŭstralia registaro rilate centoj da afganaj rifuĝintoj. Nia k-do Kep Enderby persone protestis ĉe la aŭstraliaj instancoj. Li sugestas al la SAT-anoj ke ili sendu protestleterojn al la lokaj aŭstraliaj ambasadejoj.

LIBERECANA FRAKCIO



Nova adreso de la sekretario:
"SAT-Liberecana Frakcio"
c/o ANARCHIST FEDERATION
Dept Z
73 Humberstone Gate
Leicester LE1 1WB
GB-Britio

La nova sekretario estas nia kamarado Robert BLOW.
Esperantistaj liberecanoj havas novan diskutejon en la reto. La partoprenantoj en la diskutejo ne devas esti nepre SAT-anoj. La adreso de la diskutejo estas: <esperanto_liberecano@yahoogroups.com>
Por aliĝi sendu vian peton al: <pagadoro@skynet.be> aŭ al <liberecanaligilo@mac.com>

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Dankon.


La Redakcio

PROTOKOLO DE LA LABORKUNSIDOJ EN NAGYKANIZSA

SOLENA MALFERMO

Sabate la 14-an de oktobro okazis solena malfermo de la 74-a Kongreso de SAT. Ĝi komenciĝis per muzika peco, kiun ludis juna filino de nia k-do *Tibor Szabadi*, *Rika Szabadi*, akompanata per violono, de ŝia instruisto *Nemet Ferenz*. Ludanto de tradicia hungara muzikilo «tarogato»estis *Béla Barath*.

La prezidanto de la OKK k-do *Tibor Szabadi* unue salutas la gekongresantojn, urbestron de Nagykanizsa kaj la prezidantojn de la inaŭguro. Li prezentas ĉiujn, kiuj sidas sur la podio. Temas pri s-ro *Prinz Oskar*, ĉefsekretario de la Hungaria Esperanto-Asocio, k-do *Kep Enderby*, prezidanto de UEA, Urbestro de Nagykanizsa, s-ro *Tütö Istvan*, k-do *Yves Peyraut*, prezidanto de la P.K. de SAT, k-do *Gilbert Ledon* el Brazilio, kaj k-do *Kreŝimir Barkoviĉ*, ĝenerala sekretario de SAT. Li invitas la urbestron malfermi la kongreson. La urbestro diris:



Dum la solena malfermo, staras k-do Kep Enderby
Fotis: R. Bouchet

«Estimataj gesinjoroj! Mi elkore salutas vin en nia urbo. Antaŭ unu jaro kelkajn el vi mi renkontis en Moskvo kaj ankaŭ ĉi tie estas niaj Moskvaj geamikoj. Mi estas fiera ke en nian urbon alvenis esperantistoj el 25 landoj. La lingvo Esperanto peras pacon. Mi estas certa ke ankaŭ dum la tuta kongreso, ĝi peros la pacon. Mi renkontis multajn konatajn vizaĝojn kaj mi tre ĝojas ke ĉeestas multaj novaj vizaĝoj. Mi bedaŭrinde ne parolas esperanton, sed se vi deziras paroli kun mi vi povas per la angla kaj germana lingvoj. Mi esperas ke dum tiu ĉi semajno vi iom pli konatiĝos kun ni kaj kun nia kulturo. Kun amo ni akceptas niajn gastojn. Antaŭ unu semajno ni subskribis kontrakton valoran unu miliardon da dolaroj kun iu industrio. Ĝuste antaŭ la malfermo de tiu ĉi kongreso mi malfermis la kunvenon de numismatoj. Mi proponas ke vi ankaŭ rigardu tiun ekspozicion de numismatoj. Post iom da tempo mi bedaŭrinde devos foriri al alia grava kunveno. Samtempe en la urbo okazas militista ĉevala sporta evento, kiun mi ankaŭ proponas al vi. Ankaŭ mi povas diri al vi ke vi pasigos ĉi tie la plej varmajn tagojn en nia lando. Mi elkore plian fojon salutas vin ĉiujn esperante ke vi pasigos ĉi tie agrablan semajnon kaj kun ĝojo kaj bona sano revenos al viaj hejmoj. Kompreneble mi esperas ke vi foje revenos en nian urbon. Dankon.»


S-ro *Oskar Prinz* salutas nome de la Hungaria Esperanto-Asocio, kiu estas iom fiera ĉar inter la organizantoj estas ankaŭ membroj de HEA. Li informas pri la aktivecoj de HEA, kaj anoncas ke en Hungario pasintjare pasis ŝtatan ekzamenon pri Esperanto pli ol 1600 personoj. Entute lernis ĝin 2000 personoj. Okaze de la baldaŭa aliĝo de Hungario al Eŭropa Unio, estas kreita en la lando Asocio por la egaleco de lingvoj, en kiu ankaŭ aktivas esperantistoj. Ili postulas ke en Eŭropa Unio, la hungara lingvo estu egalrajta kun ĉiuj aliaj eŭropaj lingvoj.

Sekvas la saluto de k-do *Kep Enderby*, prezidanto de UEA. Li salutas la kongreson nome de membroj de UEA kiuj troviĝas ĉie en la mondo. Speciale bonaj sukcesoj de Esperanto montriĝas en Aziaj landoj kiel ekz. en Japanio, Ĉinio, Vietnamio, Koreio. En Eŭropo estas gravaj lingvaj problemoj, kaj estas pluraj personoj kiuj parolas iomete de aliaj lingvoj, sed tio ne estas solvo por la normala komunikado. Ekz. Sinjoro urbestro krom la hungara parolas iom la anglan kaj iom la germanan, sed por solvi la problemon oni devus persvadi lin lerni Esperanton. Li deziras al la kongreso fruktodonan kongreson.

Sekvas la salutoj de reprezentantoj de diversaj landoj. Nome de SAT-anoj en Britio kaj de SATEB salutas la kongreson k-do *Arturo Prent*. Li estas kontenta ke al tiu ĉi kongreso alvenis pli da gekongresanoj ol en la lastaj jaroj. Nome de Aŭstriaj SAT-anoj bondeziras k-do *Max Hollinger*. Nome de belgaj SAT-anoj salutas k-do *Jakvo Schram*. K-do *Robert Pontnau* salutas nome de franciaj esperantistoj kaj deziras fruktodonan laboron. El Jugoslavio salutas nome de jugoslaviaj SAT-anoj k-dino *Tereza Kapista*, kiu dankas al ĉiuj kiuj kuraĝigis ilin. K-dino *Masako Tahira* venas el Kioto kaj salutas nome de japanaj SAT-anoj. El Nederlando, salutas nia landa perantino, k-dino *Corrie Kwantes-Kooij*. K-do *Marcelo Hardy* salutas nome de SAT-Amikaro, franclingvia LEA. El Rusio, salutas nia landa peranto, *Nikolao Gudskov*, kiu deziras ke la nombro de kongresantoj estu ĉiujare pli kaj pli granda. El Aŭstralio salutas s-ino *Jeniffer Fischer* el Melburno. Ŝi salutas nome de Aŭstraliaj esperantistoj kaj nome de la loka Radio ZZZ. El Malagaŝio salutas *Lala*, kiu dankas al ĉiuj amikoj kiuj ebligis al ŝi partopreni la SAT-kongreson. K-do *Djemil Kessous* salutas nome de Universalista Ariĝo kaj bondeziras al la kongreso. K-do *Marteno Bustin*, hispana landa peranto, salutas nome de hispanaj SAT-anoj. K-do *René Ballaguy* salutas nome de la SAT-Frakcio por la distribua ekonomio. El Kubo salutas la kongreson k-do *Juan Ramon Rodrigez Gomes*, nome de Kuba Esperanto-Asocio. K-do *Vaclav Stiburek* salutas nome de tri ĉeestantaj ĉeĥaj esperantistoj kaj deziras sukceson al la kongreso. K-do *Gary Mickle* salutas nome de Libera Esperanta Asocio por germanlingvaj regionoj. K-dino *Tamara Popova* salutas nome de ukrainiaj kaj odesaj esperantistoj kaj transdonas mesaĝon pri kiu ŝi deziras diskuti. El Litovio salutas k-dino *Irena Butnoriene*, nome de litovaj esperantistoj kaj deziras sukceson. Je la nomo de TANEF kaj k-do *Bert De Wit* salutas k-dino S*tella de Weerd*. K-do *Herman Theobald* el Stokholmo transdonas salutojn nome de SLEA. K-do *Vincent Charlot* transdonas mesaĝon de k-do *Petro Lévy* kaj nome de la Komunista Frakcio de SAT. K-do Lévy bedaŭras ne povi ĉeesti pro la sanstato. Tiu ĉi frakcio salutas supertendence la kongreson kaj ĉiujn aliajn frakciojn de SAT. Komunista frakcio, laŭ Statuto de SAT, zorge neniel intervenas en la internajn aferojn de SAT kaj atentigas ĉiujn SAT-anojn ke debatoj kaj diskutoj gvidu al bono kaj prospero de SAT. Li aldonas sian personan saluton kaj tiun de la skipo de UEA ĉe UNESKO. K-do *Martin Stuppnig* salutas la kongreson je la nomo de la komitato de Alp-Adria Regiono. Nun okazos kvar sinsekvaj aranĝoj en la lokoj kiuj apartenas al tiu Alp-Adria regiono. Li konstatas ke bedaŭrinde la movado pli kaj pli ŝrumpas. K-do *Bruno Henri* salutas nome de la Franca Fervojista Asocio. Li anoncas ke ilia loka klubo organizos venontjaran kongreson de SAT-Amikaro en Vigy apud Metz en Francio, al kiu estas ĉiuj invititaj. K-do *Jakvo Schram* salutas la kongreson je la nomo de la Liberecana Frakcio de SAT. K-do *Ledon* salutas nome de la SAT-anoj el Brazilio, kaj konstatas ke ĝenerale la laborista movado ŝrumpiĝas. K-do *Barkoviĉ* legas la saluton de la Amikeca Reto kaj k-do *Rollin*. *Anjo Amika* salutas nome de la esperantistaj artistoj. K-dino *Isabela Martinez* salutas je sia propra nomo.Kiel la lasta parolas la prezidanto de la P.K., k-do *Yves Peyraut*.

Li diras: *«Karaj gesamideanoj, karaj geamikoj, karaj gekamaradoj. Ĉi foje mi komencos mian finan paroladon per iuj nekutimaj vortoj, ĉar hieraŭ vespere jam okazis iu granda kunveno kaj la OKK petis de Kreŝimir Barkoviĉ kaj de mi mem, ke ni partoprenu tiun kunvenon. Vi estis multaj en tiu ĉi salono kaj ni*

ne. Do, ni volas peti al vi senkulpigon, ĉar ni ambaŭ estas tiel mallertaj ke dum tri horoj ni vagis tra la urbo por trovi niajn hotelojn. Pli serioze, la OKK ĉi tie multe penis por organizi tiun ĉi kongreson. Videble ili havis la helpon de ĉiuj instancoj de la urbo kaj de la provinco. Do nia unua tasko estas tre varme (en tiu ĉi varmeco) danki al nia urbestro pro ĉio kion li faris.



Salutas s-ro Oskar Princ nome de Hungara E- Asocio
Fotis: R. Bouchet

Oni povas diri ke okazis iu antaŭkongreso de SAT, kiu daŭris nur kelkajn horojn. Survoje al Nagykanizsa tri PK-anoj kaj k-dino el Malagaŝio tranoktis ĉe nia k-do Mikaelo Scherm el Germanio, kiu nun estas redaktoro de SR kaj loĝas en Weissenhorn, proksime de Ulm. Li provokis spontanean kunvenon de SAT-anoj kaj ne-SAT-anoj en sia loĝejo. Ni estis 18 personoj. Tie ni SAT-umis. El tio produktiĝis kvazaŭ decido ke en 2004 ni kongresos en Neuburg am Donau (Germanio).

Mi volas ankaŭ atentigi, ke en tiu ĉi kongreso, kvankam ne tre multnombra, estas reprezentataj ĉiuj kontinentoj, kaj tio montras ke nia diasporo okupas ĉiujn lokojn en la mondo. Plie mi havas la impreson ke nia asocio jam de du jaroj ŝanĝiĝas, kaj estas pli kaj pli en la vivo. Do, mi invitas ĉiujn nombre partopreni niajn laborkunsidojn por komune trakti, kiamaniere savi la vivon de nia k-do Billy Waldon - Sekvojo, danke al niaj propraj klopodoj kaj helpe de grandaj asocioj kiel Ligo de Homaj Rajtoj, Amnestio Internacia kaj kelkaj eminentuloj, advokatoj, kiujn mi renkontis en Strasburgo kaj kiuj batalas por ke oni ne nur savu Sekvojon, sed ankaŭ, por ke en tiuj du grandaj demokrataj landoj, Japanio kaj Usono, oni abolu la mortpunon. Se SAT povos eĉ iomete roli en tiu batalo, ni povos esti fieraj pri ni.

Ni devos ankaŭ helpi al la liberigo de niaj rusaj gekamaradoj, kiuj nun estas arestitaj en Rusio. Fine estas iu vasta temo pri la tutmondigo kiun ni traktos dum niaj debatoj. Mi esperas ke danke al la bona organizado de la kongreso kaj via aktiva partopreno en la laboroj, ni povos diri ke ni havis vere bonan kongreson».

S-ro urbestro denove petas la parolon: *Estimataj gesinjoroj. Mi denove petas la parolon, ĉar s-ro prezidanto invitis vin ĉeesti la kunvenojn. Mi antaŭe estis en Jerusalemo kie estis granda konferenco kie estis pli ol mil personoj kune. Ankaŭ tie parolis unue prezidanto kaj sekvis urbestro de Jerusalemo, kaj li tion diris al la ĉeestantoj: «Ĉi tie estas multaj vizitindaj lokoj, do vizitu ilin». Mi scias ke vi tre ŝatas la lingvon Esperanto, kaj ke vi partoprenos la kunvenojn, kaj poste vi kune povos viziti la urbajn vidindaĵojn. Nun mi volas prezenti al vi salutojn de prezidanto de nia departemento, kiu bedaŭrinde ne povis mem alveni. Denove mi deziras agrablajn kunsidojn kaj amuzojn. Nun mi devos foriri sed mi esperas ke okaze de la fermo de la kongreso ni povos denove renkontiĝi».*

Per tio finiĝis la solena malfermo.

Sekvis komuna fotado kaj posttagmezaj ekskursoj.

UNUA LABORKUNSIDO

K-do *Yves Peyraut*, kiel membro de la Plenum-Komitato malfermas la unuan laborkunsidon. En la komenco oni memoras pri niaj forpasintaj gekamaradoj, kiuj forpasis inter la du kongresoj.

Okazas elekto de kongresaj prezidontoj kaj de membroj de la proponkomisiono. Kiel prezidontoj estas elektitaj: gekdoj *Franciska Toubale*, *Gilbert Ledon*, *Nikolao Gudskov* kaj *Arturo Prent*. Por la proponkomisiono estas elektitaj: *Jakvo Schram*, *Vincent Charlot* kaj *Gary Mickle*.

La unuan laborkunsidon prezidas k-dino *Franciska Toubale*.

Billy Waldon - Jam dum la inaŭguro, k-do *Yves Peyraut* memorigis pri la problemo de *Billy Waldon*, kaj la kontaktoj kiujn SAT havis por agi favore al li. K-do *Yves Peyraut* informas pri sia partopreno al la unua kongreso kontraŭ la mortpuno, kiu okazis junie en Strasburgo. En Sennaciulo jam oni povis legi ke ni havas grandan malfacilaĵon por havi informojn kiuj koncernas Billy Waldon. Dank'al iu svisa instituto ni ricevis dosieron kiun ni resumis en Sennaciulo. Krome nia k-do *Kreŝimir Barkoviĉ* dum dek minutoj povis paroli telefone kun k-do Waldon, kiu telefonis al ni el la karcero en Kalifornio. Do post kvar jaroj da laboro ni povis ekscii iom pli kaj diri al li ke ni zorgas pri li. K-do *Nathan Gant*, kiu loĝas en Kalifornio, akceptis esti nia peranto inter Billy Waldon kaj ni. Danke al k-do Gant ni nun havas la adresojn de du advokatinoj kiuj loĝas en Teksaso kaj kiuj zorgas pri la apelacio. Kiam estis anoncita la unua kongreso kontraŭ la mortpuno en la reto, la PK diskutis pri tio kaj decidis partopreni, por provi fari ion favore al Billy Waldon. Ni aliĝis al la kongreso. K-do Peyraut iris al la kongreso dum du tagoj. Estis grandega kongreso kun multaj eminentuloj kaj gravuloj, politikistoj, ministroj kaj advokatoj. Finfine, krom la helpo al Billy Waldon, SAT povus aktivi favore al la abolo de la mortpuno ĉie en la mondo. Nuntempe estas 189 ŝtatoj aliĝintaj al UN-o. El tiuj ankoraŭ 89 konservas la mortpunon. Inter ili kelkaj konataj landoj, kiel Usono, Japanio, Ĉinio, Kubo kaj aliaj. Inter ili kelkaj tamen aplikas «moratorion», t.e. ke provizore ili ne aplikas mortpunon. Fakte la celo de la kongreso estis premi la usonan registaron por ke ĝi abolu la mortpunon. La iniciatintoj kredas ke se Usono abolos la mortpunon, multaj aliaj sekvos ĝin. Mi renkontis en la kongreso la prezidanton de la Ligo pri homaj rajtoj, francan ĵurnalistinon kiu okupiĝas pri la sama temo, kiuj estas pretaj fari ion por savi Billy Waldon. Krome mi renkontis du usonajn ĵurnalistojn kiuj same promesis helpi en nia afero.

S-ro *Petro Miles*, informas ke Billy Waldon kontaktis lin antaŭ pluraj jaroj kaj informis lin kiamaniere li estis kaptita. Li estis false akuzita ĉar oni metis en lian aŭton objektojn laŭ kiuj poste oni akuzis lin. Li certe ne estas tiuspeca persono kiu povus fari tiajn krimojn.

K-do *Marcelo Hardy*, demandas sin, ĉu li vere kulpas aŭ ne? Se li ne kulpas, ni devas ĉion fari por savi lin. Due pri la abolo de mortpuno. Se ĝi estas abolita, ĝi estas anstataŭata per io alia. Kaj kelkfoje tiu anstataŭo povas esti pli malbona ol la morto. Ĝismorta enkarceriĝo en teruraj kondiĉoj certe ne estas progreso.

K-dino *Nora Caragea* aldonas ke Billy Waldon fakte rifuzas la helpon ĉar li estas konvinkita pri sia senkulpeco, sed tio malfaciligas la tuton.

K-do *Jakvo Schram* opinias ke temas pri du aferoj: ĉu ni volas helpi al Billy Waldon, kaj due ĉu ni estas kontraŭ la mortpuno. Do, ni helpu al Billy Waldon, sed ni alprenu pozicion kontraŭ la mortpuno. Li mem estas nete kontraŭ la mortpuno.


K-do *Ledon* opinias ke ni tuŝas ĉi tie tre gravan problemon. Kompreneble principe neniu rajtus mortigi. Tio aplikiĝas al ĉiuj, al la viktimoj kiuj jam mortis kaj al la murdisto. La murdistoj, kiuj restas kelkajn tagojn en malliberejo, fuĝas el ĝi kaj reatencas, remurdas siajn kunhomojn. Tiu problemo estas aparte grava en Sudameriko. Mi persone havis okazon iun matenon havi la viziton de kvar individuoj kiuj metis siajn pafiltubojn ĉe miaj tempioj. Ili eniris en mian domon, ŝtelis ĉion kion ili povis, preskaŭ mortigis min ĉar mi ne havis kofron kun multaj dolaroj en mia hejmo. Tiuj homoj estas liberaj kaj verŝajne daŭrigas la aferon. Por mi tiuj homoj estas homoj kiujn mi nomas rubhomoj. Tiu problemo tuŝas ankaŭ la mortpunon. Ni ĉiuj estas mortkondamnitaj kaj neniu el ni eskapos de ĝi. Ni havas nur unu rajton, kaj la resto estas devoj. Tiu rajto estas la rajto pri vivo, kaj nia devo estas ne atenci la vivon. Mi ne estas favora al la mortpuno, sed mi estas favora al la eduko por ke tiuj ruboj ne okazu. Tiuj murdistoj devas esti forigitaj el nia socio kaj la mortpuno estas nur detalo.

S-ro *Petro Miles* plene konsentas kun Gilbert Ledon, sed tio ne koncernas Billy Waldon. Li agis favore al la indianaj rajtoj kaj tio ne plaĉis al usonaj instancoj.

K-do *Djemil Kessous* atentigas ke ni vivas en iu soci-sistemo kiu produktas multajn rubojn, kaj inter ili la homajn. Do oni devas ŝanĝi la sistemon.

S-ino *Ana Montesinos* opinias ke estas duspecaj murdoj. Kiam iu individuo murdas iun, la leĝo estas kontraŭ li kaj li estas punata. Alia afero estas oficialaj murdoj, fare de la ŝtato, polico aŭ armeo, kie oni povas murdi senpune. Tio tute ne estas akceptebla.

K-do *Gary Mickle*, provis serĉi informojn en la reto pri Billy Waldon kaj nenie trovis iujn informojn kiuj pruvus ke temas pri politika komploto. Neniu indiana organizaĵo okupiĝas pri li. Oni ne vidas ke li politike agis tiel, ke la usona ŝtato pro tio persekutus lin.



Salutas prezidanto de U.E.A. k-do Kep Enderby
Fotis: R. Bouchet

K-dino *Nora Caragea* opinias ke oni turmentas Billy Waldon jam de preskaŭ 20 jaroj en malliberejo, same kiel oni faris pri lia samtribano kies afero similas al tiu de Sekvojo. Ili estas punataj ĉar ili estas indianoj aŭ apartenas al iu indiana tribo. Antaŭ nelonge estis mortigita murdisto kiu murdis pli ol 160 personojn, ĉar tio estis pruvita kaj li agnoskis tion sen iu ajn bedaŭro. Li rapide estis ekzekutita. Dume, ĉi tie tiuj du homoj kiuj faris nenion, mortaĉas dum jaroj en malliberejo, kaj tio estas granda maljusteco.

K-do *Yves Peyraut* konkludas. Billy Waldon estas en karcero ekde 1986. La dosiero ĉe la justico pri lia kazo havas 27000 paĝojn. Do, ne eblas legi la verajn informojn. Sed kion ni faru por helpi lin. Do ni diskutu pri tio aparte dum unu el venontaj laborkunsidoj. Same pri la agado kontraŭ la mortpuno.

Feliĉuloj : K-do *Gudskov* informas ke pli kaj pli evidentiĝas ke la vera kaŭzo de la aresto estas politikaj ludoj. La registaro deziras kontroli ĉiujn junularajn asociojn kaj grupojn. Tiuj kiuj lastjare partoprenis la kongreson en Moskvo konatiĝis kun ili kaj povis konstati pri kiaj homoj temas. Jam pasis sep monatoj de la esplorado kaj tiu periodo estas plilongigita ĝis septembro. Oni havas la impreson ke la esploristo ne povas trovi pliajn elementojn ol tiujn kiujn li jam havas sed tio daŭras ĉar li devas montri ke li bone laboras. Estas certe se oni kondamnas ilin al prizono, oni povas ankoraŭ ion fari aŭ almenaŭ oni scias je kiu tempo oni estas kondamnita, sed kiam oni proklamas vin freneza kaj transdonas al la psikiatroj, tio estas multe pli grava. Tamen iliaj advokatoj diras ke la dua solvo estas pli bona. Nun oni devas atendi la okan de septembro kiam finiĝos esplorperiodo kaj oni povos sekvi la evoluon de la afero. Ĉi momente tiuj kvar personoj troviĝas en la esplorfaka frenezulejo pro tutmonata psikiatra esploro. La asocio en kiu Nikolao laboras *«Glasnostj»*, okupiĝas pri tiaj kazoj kaj jam kelkaj gazetoj parolis pri tio (vd. dosieron en aŭg.-sept. numero, NDLR).

K-do *Peyraut* aldonas ke artikolo el la rusa gazeto estis tradukita kaj aperis en la franca revuo *«Courrier International»* (Internacia kuriero). Ni nun devas pridiskuti kiamaniere ni, SAT, povas plej efike helpi al liberigo de tiuj gekamaradoj.

K-dino *Toubale atentigas* ke en la raporto jam estis propono ke ĉiuj skribu al la rusa ambasadejo de sia lando por demandi kio okazas pri tiuj homoj. K-do *René Ballaguy* donas kelkajn impresojn el Moskvo, ke tiuj homoj multe helpis al nia kongreso kaj kongresanoj. K-do *Barkoviĉ* aldonas ke SAT sendis jam du leterojn al la rusa ambasadejo en Parizo kaj ke neniam alvenis ia ajn respondo. K-do *Peyraut* konstatas ke tiaj instancoj (ambasadejoj, registaroj), reagas nur kiam oni faras ion perforte. La paperoj iras plej ofte en la rubujon. Sed nun, kiam tio aperis en internaciaj gazetoj, ni povus sendi la trian leteron dirante:» Ĉu vi vidas ke internacie oni parolas pri tio kaj do kial vi mem silentas?»

K-do *Hardy* skribis dufoje al la gazeto *«Ondo de Esperanto»* en kiu tiuj personoj estas akuzataj tute neprecize, sen iaj ajn pruvoj.

K-do *Krombeen* opinias ke kadre de la kongreso oni povus sendi protestleteron al la rusa ambasadejo en Parizo, ĉar individuaj protestoj ne estas efikaj. K-do *Theobald* informas ke SLEA ankaŭ skribis al la ambasadejo en Svedio, same sen respondo. Sed, kvankam ili ne respondis, ili eble tamen sendis tion al Moskvo kaj tio tamen povas esti efika.

Sino *Ana Montesinos* opinias ke tute male, se la homoj skribas individue, tio estas pli efika ol kiam skribas iu institucio.

K-do *R. Blow* ankaŭ skribis al ambasadejo en Londono kaj ricevis nenian respondon. Amnestio internacia respondis ke ili okupiĝas pri la afero.

K-do *Arturo Prent* opinias ke jam la disvastiĝo de la informo estas tre grava. Ju pli da homoj konas la aferon, ĝi fariĝas grava kaj la registaroj konsideras tion. *Nikolao Gudskov* informas ke Amnestio Internacia rifuzas okupiĝi pri ili ĉar laŭ ĝi la akuzoj ne estas politikaj? Tamen ili akceptas okupiĝi pri la fakto ke *Jurij Davydov* estis terure batita en la karcero. Akuzoj estas krimaj: «kreo de senleĝa armita taĉmento», «kreo de asocio por kontraŭhomaj celoj», «ŝtelado de la homoj» - do se tion oni «pruvus», tio sufiĉas por 20 jaroj en prizono. Evidente, tiuj akuzoj estas provizoraj, ĉar ne estas pruvoj.

K-do *Schram* subtenas la proponon de k-do *Krombeen* ke oni skribu modelon de letero al la ambasadejo kaj ke ĉiu povu skribi individue. Ankaŭ el la kongreso oni povus sendi la leteron.

Oni voĉdonas pri diversaj proponoj. Ĉiuj akceptas la verkadon de la letero kiu aperos en Sennaciulo por ke ĉiu povu kopii kaj sendi ĝin al la rusaj ambasadejoj, de sia lando aŭ rekte al Moskvo. Decidite ke oni sendu la leteron el la kongreso al la rusa ambasadejo en Budapeŝto.

Unua de majo - manifestacioj : nenia diskuto.
Per tio finiĝis la unua laborkunsido.

DUA LABORKUNSIDO

Kunsidon prezidis k-do *G.Ledon.*

La unua temo kiun la kongreso devis laŭvice pritrakti estis la **Solidareca Reto** kaj prezidanto de la kunveno alvokis ĉeestantojn doni siajn opiniojn.

Prezidanto de la PK de SAT, k-do *Ivo Peyraut* precizigis, ke Solidareca Reto estas aparta asocio, ne ligata al SAT. Asocio estis trovita inter multaj aliaj kiuj prezentis sin en Interneto kaj uzas Esperanton. Ĝi estis kreita antaŭ multaj jaroj en Francio, en Bretonio, havas la ligon kun alia vasta federacio, kiu nomiĝas Solidaraj popoloj kaj praktike tiu asocio kolektas monon por helpi malriĉajn landojn en Afriko k.t.p. Plenum - Komitato opiniis, ke tiu asocio povas esti interesa por SAT- membroj kaj petis, ĉe Solidareca Reto la dosieron por konatiĝi kun ili pli bone.


K-do *R. Ballaguy* eldiris la esperon, ke ĉiuj partoprenantoj de la kunveno scias pri alia organizo kiu ankaŭ uzas Esperanton, nome, pri la Mondcivitanoj. Tio estas speciala asocio kiu celas helpi la malriĉajn landojn kaj ne nur helpi, sed ankaŭ ebligi, ke poste ricevintoj de helpo siaflanke helpu al aliaj. Li invitis tiujn kongresanojn kiuj interesiĝas pri la afero kontakti lin aŭ *Geneviève Charpentier* kiu prizorgas la aferojn de esperantistaj mondcivitanoj.

Intervenis k-ino *Popova* sugestante, ke la kongreso limigu la daŭron de paroladoj por unu persono ĝis du minutoj. Ŝi ankaŭ petis la permeson paroli ekster la temo, ĉar ŝi estas komiisita transdoni al kongreso dokumenton de Odesaj esperantistoj laŭ la temo Rilatoj kun LEA. Ŝi klarigis, ke ŝi devas forlasi la kongreson iom pli frue, do ŝi timas, ke dum tiu - ĉi kunsido tiu punkto ne estos atingita.

Kongreso akceptis la peton kaj k-ino *Popova* diris, ke post iom da tempo ŝi estos preta paroli. Intertempe la kongreso daŭrigis la laboron laŭ la raporto de la PK. Prezidanto de la kunsido k-do *G.Ledon* anoncis, ke oni pritraktos la temon **Monda fonduso de solidareco kontraŭ la malsato**. Li mem eldiris sian

opinion, ke neniam SAT solvos la problemon de la malsato. Laŭ li, la problemo estas tiel granda kaj ampleksa, ke ĝin solvi oni povas nur reformante la tutan sistemon de la sociordo. La celo de SAT estas donita en la Statuto kaj tio estas per klerigado kaj agado tiun sociordon ŝanĝi.

K-do *R.Ballaguy* nur kompletigis la vortojn de G.Ledon per la moto de V. Hugo : «Vi volas la mizerulojn helpatajn kaj mi volas la mizeron forigitan». K-do *J. Schram* havis la demandon ĉu la temoj nun pritraktataj dum la kunsido povas respeguliĝi en la gvidrezolucio: ke SAT estas favora al la Monda Fonduso, Solidareca Reto, aŭ parolantoj nun donas la personajn opiniojn kiel membroj de asocio?



Muzika enkonduko de la solena malfermo

Fotis: R. Bouchet

Prezidanto de kunveno konfirmis, ke tio povas respeguliĝi en la gvidrezolucio.

K-do *R.Prevost* parolis pri tio, ke esperantistoj unue devus helpi esperantistojn, ĉefe tiujn de la malriĉaj landoj.

K-do *G.Ledon* konsentis, ke kiel esperantistoj ni povas helpi unu la alian, sed en la monda mizero tio estas nur la guto en la oceano.

S-ro *P.Miles* eldiris sian ideon, ke ekzemple, loĝantoj de tiel nomata riĉa parto de la mondo povus sendi la anglalingvajn aŭ franclingvajn gazetojn al anglalingva aŭ franclingva parto de Afriko, kaj tio estus granda helpo al kompatindaj afrikanoj kiuj ofte ne povas pagi eĉ la poŝtmarkojn.

K-do *G.Ledon* aldonis, ke ofte kiam li vojaĝis al Afriko li spertis la postulojn de lokaj afrikanoj, ke ekskoloniistoj havu la devon daŭre subteni Afrikon, kiun antaŭe oni ekspluatis.

S-ino *A.Montesinos* komentis la vortojn de s-ro *P.Miles*, ke li uzas la esprimon kompatindaj afrikanoj, sed laŭ ŝia opinio, tiuj homoj nur ne povas pagi, sed ili ne estas kompatindaj.

Laŭ la propono de la prezidanto de la kunsido k-do *G.Ledon*, la kongresanoj transiris al la pritraktado de la alia punkto: **Forumo pri Esperanto Civito**.

Ĝenerala sekretario de SAT, k-do *Barkoviĉ* diris, ke pri E -Civito jam dum kelkaj jaroj SAT-membroj povas havi la informojn de esperanta gazetaro. Li ankaŭ memorigis, ke antaŭ du jaroj en Karlovy Vary paralele al SAT kongreso okazis Forumo de E - Civito. Tiam SAT estis invitita kiel observanto kaj same en tiu ĉi jaro nia asocio estis invitita al Sabloneto en Italio, kie okazis Forumo de Esperanto Civito. Plenum Komitato delegis sian ĝeneralan sekretarion kaj li iris tien por partopreni en la renkontiĝo kiel observanto. Dum tiu renkontiĝo li promesis honeste informi la SAT membrojn pri Forumo kaj pri la proponoj faritaj al SAT tie. Li disdonis al la ĉeestantoj de la kunveno kopiojn de la Pakto, ke ĉiuj povu konatiĝi kun tiu dokumento.

K-do *J.Schram* demandis ĉu la dokumenton oni povas meti en la TTT paĝon, ke ĝi estu atingebla por ĉiuj kiuj interesiĝas.

K-do *Barkoviĉ* respondis, ke ekzistas la TTT paĝo de Esperanto Civito kie estas ne nur la teksto de la Pakto, sed ankaŭ multe pli da informoj pri Esperanto Civito kaj tio kio okazis en Sabloneto. Li klarigis, ke Pakton jam subskribis grupo de esperanto asocioj. Esperanto Civito proponas ankaŭ al SAT aŭ al la redakcio de Sennaciulo, aŭ al la redakcio de Sennacieca Revuo aliĝi al la Pakto. K-do *Barkoviĉ* substrekis, ke en Sabloneto li havis nenian decidpovon, sed la kongreso havas tiun povon kaj povas decidi ĉu akcepti la proponon. Li petis, ke ĉiuj atente studu la dokumenton akceptitan en Sabloneto por scii kion Esperanta Civito proponas kaj faru la decidon.

K-ino *F.Toubale* diris, ke persone ŝi ne vidas la neceson aparteni al iu kategorio. Ŝi sentas sin vera homo sur la tero kaj ne vidas sencon distingi sin de aliaj. Ŝi diris, ke havante francan pasporton kaj loĝante en diversaj landoj ŝi jam spertis diversajn malfacilajn cirkonstancojn kaj ŝi ne komprenas kial ŝi devus aldoni ankoraŭ ion?

K-do *V.Charlot* unue esprimis sian konsenton kun la ĝisnuna pozicio de SAT en la rilatoj kun Esperanta Civito. Laŭ li SAT povas observi, ĉeesti la forumojn, ricevi la proponojn, k.t.p. de tiu vidpunkto. Parolante pri la aliĝo al Pakto li diris, ke jam de la unua trarigardo de la teksto li vidas multajn punktojn kiuj ŝokas lin. Do, li proponis, ke ĉiuj atente legu, bone studu la tekston, ĉar tie estas pluraj aferoj ŝokegaj por la SAT-anoj. Se SAT-membroj diras, ke ni estas sennaciecaj kaj ne apogas la ŝtatan agadon, kial do ni devus aliĝi al io, kie ĉiuj institucioj de la ŝtato estas kopiitaj kaj eĉ sen la ŝtato mem. Laŭ opinio de V.Charlot estus amuze havi la senŝtatan Konstitucion kaj senŝtatan Kortumon, sed li pensas, ke estas ankaŭ danĝero en tiu afero: la misprezento de Esperanto-movado. Ja oni povus ridi pri tio. Se ni vere aliĝus al tiu Pakto, tiam SAT eĉ estus submetita al la decidoj de Kortumo, kies verdiktoj ne estas apelacieblaj. V.Charlot proponis, ke asocio daŭrigu la normalajn rilatojn kun Esperanta Civito, sed ne aliĝu al la Pakto kaj ne subskribu ĝin.

Intervenis k-do *Barkoviĉ* kiu proponis, ke kongresanoj ne tuj traktu la aferon. Ja unue ĉiuj devas legi la dokumenton, bone pripensi la aferon kaj nur tiam pritrakti ĝin. Li diris, ke pli bone estus reveni al la temo dum la venonta kunsido, kiam ĉiuj jam havos opinion.

K-do *A.Prent* scivolis, ĉu tiuj PK-anoj kiuj jam studis la Pakton ne trovis la kontraŭojn inter la Pakto kaj la Statuto de SAT.

Laŭ propono de *K.Barkoviĉ* kongreso decidis reveni al la temo dum la venonta kunsido ĵaŭde matene.

Antaŭ ol la prezidanto de la kunveno *G.Ledon* anoncis novan temon **SAT- diskuto en la Reto** li esprimis sian opinion, ke la Pakto kaj SAT-statuto ne kongruas pro la simpla fakto, ke SAT estas supertendenca kaj Esperanto Civito estas iu ŝtateca afero, do fremda almenaŭ al la liberecana pensmaniero.

K-do *V.Charlot* parolante pri la temo SAT-diskuto en la Reto diris, ke ĉiu vigla asocio malfermante la diskutejon travivas la saman aferon: dum 2-3 monatoj en la komenco okazas akraj diskutoj, kaj poste iom post iom tio mildiĝas. Tiel estis en la diskutejo de UEA kaj ankaŭ la SAT diskutejo travivis tiun periodon. V.Charlot opinias, ke tiu diskuteja reto estas necesa. Ja mesaĝoj aperintaj de Sennaciulo, Ĝenerala - Konsilantaro, Plenum - Komitato estas utilaj kaj li ĝojas, ke tiu iniciato aperis kaj trovas, ke la aferon oni devas daŭrigi.

K-do *J.Schram* parolis, ke li parte kulpas pro la apero de tiu diskutejo en la reto. Li diris, ke li jam havis la deziron peti ĉe V.Lutermano nuligi la aferon. Li bedaŭris, ke homoj sidante ĉe la komputoro opinias, ke ili rajtas diri tion kion ili neniam kuraĝus diri parolante. Ankaŭ li konstatis, ke homoj en la reto ne konscias, ke ili estas nur 66 SAT-anoj kiuj apartenas al la diskutantaj retanoj, do ili forgesas, ke tiu grupo ne havas la potencon rilate la strukturon de SAT. Tiu retdiskutejo, laŭ J.Schram tute nuligis la laboron de Ĝenerala -Konsilantaro, sed tion li volos pritrakti poste. J.Schram diris, ke kelkaj homoj en la reto pensas, ke ili posedas la ilon por efektivigi absolutan demokration, sed laŭ opinio de la parolanto tiu ilo estas nur kongreso kaj Sennaciulo. Li trovas, ke retmesaĝoj tamen donas bonajn ideojn, do aferon valoras daŭrigi, des pli, ke en SAT diskutejo oni estas pli afablaj ol en tiu de UEA.

K-do *M.Gary* intervenis dirante, ke ret-forumo estas tre utila por SAT membroj kiuj, kiel li, ĝis nun ne povis partopreni SAT kongresojn. La ret-diskutejo permesas konatiĝi kun multaj homoj kaj kun multaj opinioj. Parolante pri demokratio kaj legitimeco de la ret-diskutejo M.Gary konsentas, ke tio ne estas formala organo de SAT kiu havas la formalan legitimecon, sed laŭ nombro de la partoprenantoj ret-diskutejo estas proksima al tiu de kongresanoj ĉeestantaj kunvenon, do ĝi tamen havas signifon. Li opinias, ke se pli da homoj aliĝos al reto iom post iom tio fariĝos la ĉefa rimedo por konatiĝi kun la opinioj de la membraro kaj konsideri tion farante la decidojn.



El Malgaŝio salutis nin Lala
Fotis: R. Bouchet

K-do *A.Prent* substrekis, ke dum la tuta vivo de SAT estis tia disdivido: iuj anoj de SAT povis veni al kongresoj, iuj ne. En pasinteco kelkaj havis telefonojn iuj ne, do ili devis atendi la malrapidan poŝton. Nun ni havas la alian rimedon al kiu kelkaj havas la aliron, kelkaj ne, sed A.Prent opinias, ke ĉiujn eblecojn oni devas uzi kaj des pli da komunikado estas, des pli bone.

K-do *R.Ballaguy* tre emocie aldonis, ke li tute ne estas kontenta, ĉar al la ret-diskutejo aliĝis 66 homoj, sed nur 10 personoj vere skribas. Li opinias, ke en tiu medio estas esperantista elito kiu parolas kaj ĝi parolas anstataŭ tiuj, kiuj havus kion diri, sed ne parolas. Li konsentas, ke estas en la reto vere interesaj mesaĝoj, sed ankaŭ multaj bagatelaĵoj: la diskuto pri ci kaj vi, ĉu PIV estas bone nomata, ĉu bone ilustrita k.t.p. R.Ballaguy supozas, ke estas tempo paroli pri pli gravaj kaj urĝaj aferoj kaj oni devas daŭrigi la ret-diskuton, nur ne por bagatelaĵoj, sed por urĝaj kaj gravaj problemoj.

Prezidanto de la PK, *Y.Peyraut*, donis la opinion de PK pri tiu nova rimedo kaj li samtempe traktis iom raporton de PK pri la paragrafo Sennaciulo, ĉar tio havas rektan rilaton. Li konsentis, ke reto estas nur unu el rimedoj, sed por komuniki inter ĉiuj membroj de la asocio daŭre la plej konvena ilo restas Sennaciulo kiu estas samtempe kaj bulteno por la interna komunikado kaj gazeto por la ekstero. Por havi veran demokration ĉio devas aperi en la gazeto ĉar tio garantias, ke ĉiuj membroj de SAT ricevos informojn.

Parolante pri reto *Y.Peyraut* diris, ke tio iĝas problemo por PK, ĉar konstante alvenas amaso da dokumentoj. Li ŝerce konfesis, ke pli frue li ne havis fidon al tiu rimedo kaj eĉ rikanis pri ĝi, ĉar kiel maljunulo li fidis nur al la krajono kaj papero, sed nun li konstatas, ke li eraris. Nun akumuliĝas tiom da valoraj dokumentoj, sen tiuj infanaĵoj pri kiuj parolis R.Ballaguy, kaj ofte eĉ la kamaradoj kiuj neniam skribis al Sennaciulo nun per reto sendas siajn kontribuaĵojn. Rezulto estas, ke nun estas sufiĉe da materialo por Sennaciulo kun 24 paĝoj. Tio estas bona malsano, sed problemo estas nur, ke iu devas ĉion tion legi, kribri, konservi, uzi por fari dosierojn. Nuntempe tion faras mem Y.Peyraut tiamaniere laborante kiel helpanto de la redaktoro K.Barkoviĉ. Li diris, ke oni devas trovi la personon en Pariza regiono kiu farus tiun laboron: kribrus, resumus kaj pretigus la dosierojn. Li diris, ke li petis tion fari k-don V.Charlot, sed tiu fuĝis kaj ne akceptis la taskon.

Prezidanto de la kunveno *G.Ledon* aldonis ke laŭ lia opinio en la reto homoj ofte uzas malbonan lingvon, ne estas zorgemaj kaj li konsideras ke tio kaŭzas la fuŝkulturon kiu enkondukiĝas en la tuta mondo pro tiu stulta reto. Kongresanoj ridis pro la lasta esprimo kaj G.Ledon konfirmis, ke li scias kion li parolas. Ja li legas la mesaĝojn, kvankam mem ne apartenas al la retanoj.

K-do *A.Prent* proponis, ke estu kunmetitaj la temoj de la raporto de PK: Sennaciulo, SAT kaj reto, ĉar ĉiuj tri temoj interplektiĝas kaj tio ebligus ŝpari la tempon.

Prezidanto de la kunveno akceptis la proponon kaj *K.Barkoviĉ* subtenis la ideon de A.Prent, sed li tamen ne konsentis kun la eldiro de kara amiko G.Ledon, ke reto estas stulta, ĉar li trovas tion kiel tre bela kaj utila inventaĵo. Li invitis ĉiujn kiuj posedas la eblecon, aliĝi al diskutejo kaj aktive partopreni, ĉar tio ebligas tuj esprimi sin, sen prizorgado de kovertoj, poŝtmarkoj k.t.p.

K-do *A.Prent* diris, ke dum la lastaj jaroj li ne havis tempon ion verki por Sennaciulo kaj li ĝojas, ke nun venas multe da materialo, ĉar li bone konscias kiel malfacile estas trovi interesan materialon. Li diris, ke en pasinteco estis unu aŭ du numeroj kiujn li hontus montri al iu, sed la lastaj eldonoj estas bonaj. Do, li dankis al ĉiuj kiuj laboras pri tio. Pri reto li opinias, ke havante retaliron estas pli facile komuniki kaj solvi la problemojn, tio ŝparas tempon kaj SAT devus daŭrigi en la sama maniero.

Redaktoro de Sennaciulo, k-do *Barkoviĉ*, tamen atentigis, ke tio ne signifas, ke nun ĉiuj ĉesu la skribadon, ĉar estas sufiĉe da materialo. Li petis, ke tamen SAT-anoj verku kaj sendu ĉu per reto, ĉu per simpla poŝto, ankaŭ mane skribitajn tekstojn. La redaktoro asertis ke oni bezonas tre varian materialon, ke gazeto estu interesa. Li diris, ke okazas, ke homoj kiuj kutimas tion fari sendas regule la materialon kaj tiam aperas konstante la samaj nomoj dum redaktoro preferus, ke en Sennaciulo, kiu estas la tutmonda gazeto, aperu diversaj nomoj de diversaj partoj de la mondo. Kvankam nun estas en sidejo la materialo por estonto, tamen ĉiam aperas ankaŭ aktualaj aferoj.

Kdo *V.Charlot* precizigis la vortojn de Y.Peyraut, ke li ne fuĝis de la propono resumi la dokumentojn en la reto. Li nur ne povis tion fari, sed li pretas por ATTAC traduki jam resumitan artikolon. Li ankaŭ volis iom ironie aldoni, ke vortoj pri la diskutejo de R.Balllaguy pripensigis lin pri la komenco de tiu diskutejo kaj li pensas, ke oni povas havi bonajn ideojn, sed tio ne postulas tro altan tonon dum la prezentado de tiuj ideoj.

K-do *N.Gudskov* pri la reto opinias, ke ĝi estas tre utila, permesas senperan interŝanĝon de opinioj tra la tuta mondo, kaj SAT, kiu estas tutmonda asocio, devas uzi ĝin malgraŭ la fakto, ke ne ĉiuj membroj ankoraŭ posedas tiun eblecon. Li diris, ke fakte, estas malfacila afero trovi tempon por tralegi atente ĉiujn mesaĝojn, sekvi disputon. Li emfazis, ke G.Ledon riproĉas, ke en la reto oni uzas lingvaĵon, sed laŭ opinio de k-do Gudskov tiel estas pro tio, ke en la reto homoj uzas parolan lingvaĵon, rapide skribas. Tio estas kiel la konversacio en la vivo. Oni ne uzas la literaturan lingvon kaj rapide parolas per fingroj. Tio estas la avantaĝo kaj la malavantaĝo de la reto, sed reto vere estas granda atingo kaj ĝin uzas ne nur SAT. Nur laŭ parolanto oni devas trovi rimedojn por pli bone administri la diskutejon, ke ne estu ripetadoj, ke ĉio estu pli konciza, ĉar tio ebligus pli facile legi kaj kompreni la sencon de la diskuto. Li pensas, ke post kelkaj jaroj la reto estos la ĉefa rimedo por esprimi opiniojn kaj li komprenas, ke alkutimiĝi al tiuj modernaj aferoj ne estas facile por ne tro junaj homoj, sed laŭ N.Gudskov reto estas plene anarkiisma rimedo.


K-do *V.Lutermano* rakontis pri la komenco de la funkciado de SAT diskutejo: ne estis iuj insultoj, malagrablaĵoj, nur kritikoj k.t.p. kaj li konstatas, ke evoluo de la SAT diskutejo estas en kontentiga stato. Li diris, ke unue ili eĉ kreis la regularon de la diskutejo kaj li emfazis, ke en aliaj diskutejoj okazas, ke ret-diskutejo difinas ankaŭ kontribuaĵojn, sed en SAT diskutejo ĉio estas skribita ekskluzive nur por tiu SAT diskuto, do ĝi estas fermita al la cetera mondo.

K-do *R.Prevost* demandis kiom da retanoj estas utilaj al Sennnaciulo per kontribuaĵoj.

K-do *G.Ledon* daŭre insistis, ke reto estas kontraŭkultura, ĉar homoj ne plu legas, ili babilaĉas katenitaj ĉe la aparato kaj tio malhelpas la rezonon, se ne minimuman pensadon. Li diris, ke tio estas analizebla kaj psikologie analizita, ke homoj nun ne nur ne plu legas, sed ankaŭ ne iras al dancado k.t.p.

K-do *V.Lutermano* konsentis, ke homoj vere pli kaj pli

preferas spekti bildojn, sed ne legi. Tamen en la ret-diskutejo oni ne vidas bildojn, sed tekston, do estas same kiel vidi tekston en Sennaciulo. Li revenis al la aserto, ke lavangon de la mesaĝoj en la diskutejo ne eblas tralegi, sed li diris, ke estas unu rimedo por eviti tion. Temas pri tio, ke eblas elŝalti la aŭtomatan ricevadon de la mesaĝoj. V.Lutermano rimarkis, ke kelkaj eĉ eksiĝis de la diskutejo pro tio, ke ili volis eviti tro da mesaĝoj, sed kiam oni elŝaltas la aŭtomatan ricevadon de la mesaĝoj tiam eblas poste iri al la diskuteja ret-paĝo kaj legi tiujn mesaĝojn kiujn la leganto mem elektas. Li proponis helpon aranĝi la komputoron al tiuj homoj kiuj volus resti en diskutejo kaj ne ricevi siajn mesaĝojn aŭtomate.



K-do Nikolao Gudskov salutis nome de rusiaj esperantistoj.
Fotis: R. Bouchet

K-do *J.Schram* ne konsentis kun la opinio de G.Ledon. Li diris, ke ekde la momento kiam li aliĝis al la reto li ankaŭ regule devas aĉeti novajn librojn, ĉar en reto estas interesaj homoj kiuj faras interesajn demandojn, do li devas konsulti librojn. Pro tio li aŭ aĉetas la libron aŭ iras al biblioteko. Pro la lingvaĉo uzata en la reto, li klarigis, ke persone li estas emocia homo kaj li parolas per koro kaj fingroj kaj lia lingvo estas terura, sed kiam en reto li sendas la mesaĝon kaj scias, ke ĝin legas G.Ledon li ege zorge pritraktas la tekston.

K-do *G.Ledon* konsentis, ke estas la esceptoj.

K-ino *T.Kapista* dankis pro la mesaĝo de SAT okaze de la 1-a de majo kaj esprimis la bedaŭron, ke nova "demokratia" registaro akceptis la novan leĝon laŭ kiu en Jugoslavio ne plu ekzistas festo de la Unua de Majo.

K-do *Y.Peyraut* komentis, ke ofte oni devas reverki la tekstojn de reto por Sennnaciulo kaj tio kelkfoje ŝanĝas la stilon de la aŭtoroj. Li ankaŭ parolis pri tio, ke tekstoj kiuj interesas SAT en Sennaciulo aperas post la demando de la aŭtoroj, ĉu oni rajtas tion aperigi. Ĝis nun ĉiuj aŭtoroj konsentis kaj la prezidanto de PK de SAT sugestis tiujn retanojn kiuj verkas por reto sufiĉe ampleksan tekston, indiki ĉu tion oni povas uzi por Sennaciulo. Li ankaŭ petis, ke unu de retanoj kiuj diskutas, sendu la sintezon de la diskuto en la kazo, ke temo estas interesa por la legantoj de Sennaciulo. Tiel jam aperis tekstoj pri etnismo kaj estus bone havi la pliajn. Respondante al la demando de R.Prevost, Y.Peyraut diris, ke proksimume 10-15 tekstoj de la reto estis uzitaj por Sennaciulo.

K-do *K. Barkoviĉ* petis pli da opinioj pri **Sennaciulo** kiel gazeto: kritikojn, rimarkojn, dezirojn kaj promesojn. La redaktoro de la Sennaciulo diris, ke li alportis la lastan, julian numeron kaj kongresanoj povas legi ĝin same kiel la junian Sennaciulon, ĉar gazetoj estas en kongresejo.

K-do *V.Charlot* konstatis, ke ekde oktobro aŭ septembro la gazeto fariĝis pli interesa, ĉar pli frue li havis la impreson, ke ĉefe temis pri pasinteco. Li dankis pro tia plibonigo de Sennaciulo, pro la ebleco havi aktualajn informojn pri la nuna stato de la mondo. Laŭ li tiu nova blovo estas rimarkinda kaj li deziris, ke ĝi ne malaperu.

Prezidanto de la kunveno k-do *G.Ledon* aldonis, ke li samopinias kaj eĉ li sendis la mesaĝon al la redakcio gratulante tiun evoluon.

K-do *J.Schram*, informis ke kvankam li ne scias ĉu tio estas bona novaĵo tamen li konas iun personon kiu malabonis Monaton, ĉar li trovis, ke Sennaciulo estas pli interesa.

K-do *R.Prevost* diris, ke mondo konstante ŝanĝiĝas kaj se oni ne evoluas, oni tutsimple malaperas kaj tio validas ankaŭ por asocioj.

La kongreso revenis al la temo **Rilatoj kun LEA-oj** laŭ la pli frua peto de k-dino T.Popova.

K-dino *T.Popova* rememorigis, ke en la 73-kongreso en Moskvo estis akceptita la propono de Odesa grupo Esperanto 2000. Tiu grupo celas la enkondukon de Esperanto en internaciajn rilatojn en la ŝtata nivelo. La PK instigis LEA-ojn esti en la rilatoj kun aliaj esperantistaj movadoj por apogi odesanojn. T.Popova diris, ke ŝi kunlaboris kun la prezidanto de franca LEA, G.Cavalier. Dum la kunsido de LEA-oj en tiu-ĉi kongreso T.Popova raportis pri la laboro de odesanoj kaj pri de ili preparita mesaĝo, destinita al la gvidantaro de UEA kaj laboristaj E-organizacioj ligitaj al SAT. K-ino T.Popova konatigis la kongresanojn kun la enhavo de la mesaĝo. En antaŭparolo de la mesaĝo estis menciitaj provoj de esperantistoj kunlabori kun UNESCO, kun kelkaj aliaj organizoj kiuj apogas Esperanton. Ŝi diris, ke ŝi havas konkretan planon kiel fari, ke Esperanto estu akceptita kiel interŝtata lingvo por la komunikado de ĉiuj landoj en la mondo. Ŝi petis subteni odesanojn en la realigado de tiu plano finance aŭ per teknikaj rimedoj, komputoro, ebleco uzi Internet aŭ simile.

Prezidanto de la kunveno *G.Ledon* petis diri la opiniojn pri tiu temo.

K-do *V.Charlot* rimarkis, ke de la enhavo de la propono ne estas problemo, sed kvankam li ŝatas T.Popovan kaj li ne volus ĉagrenigi ŝin, al li ŝajnas, ke laŭ tiu propono devus esti inter UEA kaj SAT kreita komisiono, tute neŭtrala kiu kontaktiĝu kun la ŝtataj instancoj. Tamen, en UEA tio jam estas kaj V.Charlot dubas ĉu ankaŭ SAT devus transpreni tiun taskon. Li demandis ĉu SAT povus iamaniere kontakti la diktatorecan reĝimon, ŝtaton kiun nia asocio fakte ne agnoskas. Ĉu SAT iru al neŭtraleco kaj se jes, ĉu ne estus danĝero de kunfandiĝo inter SAT kaj UEA. K-do V.Charlot diris, ke li sentas sin ĝenata tiel respondi al la ideo de odesanoj kaj li konsentas, ke SAT helpu en kontaktoj kun aliaj grupoj en ŝtatoj, sed lin ĝenas la ideo, ke SAT oficiale faru tion.

K-ino *S. de Weerd* bedaŭris, ke ankaŭ ŝi devas kontraŭstari tiun proponon kaj ŝi memorigis, ke laŭ rezolucio de Moskva kongreso oni petas al PK, ke ĝi instigu la LEA-ojn agi en tiu senco: enkonduko de Esperanto k.t.p. Laŭ ŝia scio la PK sendis tiun instigon, sed kiel reagis la LEA-oj estas la afero de ili. La nuna afero kiun nun kongreso povas fari, laŭ k-ino S. de Weerd, estas la repreno en la rezolucio de memorigo al LEA-oj pri tiu afero. Laŭ persona opinio de la parolantino, enkonduko de Esperanto kiel dua lingvo en ĉiuj lernejoj de ĉiuj landoj en la mondo estas absolute parlamenta afero kaj por tio laboras la speciala grupo inter parlamentanoj. La grupo nomiĝas Esperanta Eŭropa Unio kaj preni en la rezolucion ian intermikson de UEA kaj SAT nun estas troigo.

K-do *G.Kessous* diris, ke ne nur UEA kaj SAT, sed ĉiuj esperantistaj organizoj de la mondo devus unuigi siajn fortojn por solvi tiun problemon.

K-do *R.Prevost* unue diris, ke li forgesis sian tekon en la restoracio, kie li manĝis. En ĝi estis teksto kiu rilatas al priparolata temo. Teksto estas skribita de fama esperantisto C.Piron kaj en ĝi temas kiel Esperanton disvastigi inter diversaj popoloj. R.Prevost intencis tiun tekston prezenti al la kongresanoj, eĉ kolekti la subskribojn de esperantistoj. Li diris, ke en Francio la eminentuloj kiuj laboras en internacia nivelo ne rajtas paroli pri la internaj aferoj de la ŝtato, sed nun C.Piron estas pensiulo do li parolas kaj skribas pri tio. R.Prevost proponis al C.Piron tion de franca traduki en Esperanton kaj eldoni kiel broŝuron kiu devus esti interesa.

En sia interveno k-do *A.Prent* diris, ke li malŝatas esti negativa en tiuj aferoj, sed ni devas bone pripensi kiel utiligi niajn tre malgrandajn fortojn rilate niajn celojn. Li diris, ke li sentas, ke oni simpligas la paŝojn bezonatajn por atingi tiun celon. Li scias, ke antaŭe estis multaj tiaj klopodoj, sed ofte kun negativaj sekvoj. Do, laŭ opinio de A.Prent, ne estis sufiĉe profunde enirita la problemo, ne bone komprenita la sinteno de homoj kaj la reago estis, ke rezulte oni estis tute kontraŭ Esperanto. Li diris, ke en Britio, Francio kaj certe en aliaj lokoj estas la homoj kiuj

strebas tranaĝi la malfacilan politikan vivon de landoj kaj trovi homojn kiuj aŭskultus ilin kaj pozitive ion farus. Do, li opinias, ke pli bone estas doni siajn fortojn por subteni tiujn klopodojn. Li bedaŭras tion diri, sed laŭ la sperto de la parolanto kvankam ideo estas bona, se SAT okupiĝos pri tio, la kvalito de Sennaciulo falos, ĉar tio deprenos la fortojn de SAT. Ja iu devus en la sidejo pri tio okupiĝi kaj rezulte nenio okazus, nur estus senditaj leteroj kiuj estus ignoritaj aŭ eĉ estus reagita negative.


S-ro *P.Miles* rimarkis, ke dum multaj jaroj de la uzado de Esperanto ĉiuj scias pri la negativaj fortoj kontraŭ ni. Tamen, ĉu ne estus bone de tempo al tempo krei la pozitivan imagon. Se ni imagas, ke la mondo unu tagon vekiĝus kaj konscius la utilecon de Esperanto, ke en gazetoj aperus anoncoj pri miloj de bezonataj E - instruistoj, libroj k.t.p., ĉu tia fantazia mondo kiu ankoraŭ ne okazos dum 100 aŭ 200 jaroj ne estus bona ekzercado por la imago?

K-do *R.Prevost* reagis al la vortoj de A.Prent, ke multaj estas kontraŭ Esperanto, sed li scias, ke triono de eŭropaj deputitoj estas por Esperanto, sed ili faras nenion. Laŭ opinio de parolanto, se ni povus kontakti ministrojn aŭ ŝtatajn prezidentojn ni malsukcesus, ĉar nun la leĝo estas kreata sur la strato. Ni estas en la tempo kiam la regantoj estas stultaj ĝis la momento kiam stratoj plenaj de homoj movas ilin.

K-do *R.Ballaguy* havis la demandon al R.Prevost kiom da homoj ni povas nun meti sur la straton?

Prezidanto de la PK de SAT, *Y.Peyraut* proponis fini la diskuton per iu decido.

K-do *V.Lutermano* sciigis, ke en Francio Komunista partio faris proponon pri lingvo kiu ne estis akceptita, sed provokis la diskuton kaj tio jam estas pozitiva. V.Lutermano opinias, ke ne sufiĉas agi nur inter politikistoj, sed ankaŭ ni devas inkludi la lingvistaron de la landoj. Tiel faras en Hungario O.Princz kiu iniciatis grupon de lingvistoj, homoj kiuj interesiĝas pri lingvaj problemoj. Ili ne estas esperantistoj, sed la celo estas, ke la naciaj lingvoj en Eŭropa Komunumo estu egalrajtaj. Li diris, ke tio estas ankaŭ vojo al Esperanto kiel solvo, sed tasko de la organizoj kiel nia, estas prepari la materialon kiun oni povus modifi laŭ la lokaj cirkonstancoj. Li diris, ke tion oni ne povas lasi al unuopuloj. Li alvokis ne nur antaŭvidi negativajn respondojn, sed ankaŭ vidi la pozitivan econ de tiu dokumento de odesanoj kiuj levas la demandon, kion nun fari en nuna situacio. Li ŝatus, ke oni havu aliajn proponojn, se tiu de odesanoj ne estas akceptata.



K-do Jakvo Schram kun entuziasmo aktivis en sia unua SAT-kongreso
Fotis: R. Bouchet

K-do *Y.Peyraut* klarigis ke dum la kunveno de LEA-oj, T.Popova proponis tiun tekston kiel la mesaĝon por UEA kaj SAT. Tamen ĉiuj ĉeestantoj de la kunsido decidis, ke tiu mesaĝo estas adresata al la gvidantaro de UEA kaj LEA-oj ligitaj al SAT. Fakte, kelkaj organizoj, ligataj al SAT faras tiun laboron. Ankaŭ en Francio plurfoje la delegitoj de diversaj E-organizoj kune renkontiĝis kun francaj deputitoj. Li pensas, ke tio estas bona vojo kaj li proponis reveni al la ideo de S. de Weerd: en la rezolucio de tiu ĉi kongreso oni rememorigu al la organizoj ligataj al SAT, ke ankaŭ tiu-ĉi kongreso denove instigas LEA-ojn agi kune, naciskale por puŝi Esperanton ĝenerale en diversaj nacioj. Li ankaŭ proponis en la rezolucio mencii, ke teksto de odesanoj estis legita kaj traktita dum la kongreso.

Prezidanto de la kunveno *G.Ledon* proponis transiri al la alia temo kaj tio estis **Opinienketo**. Estis nenia reago, do kongreso transiris al la sekva temo, **Referendumo 2001**.

K-do *M.Bustin* nur volis klarigi, ke li ne konsentas kun la komento en Sennaciulo, ke praktike la opinioj de SAT-anoj estas dividitaj duone duone. Laŭ lia kalkulo 48% estis kontraŭ kaj 52% por, do tio ne estas duone - duone.

K-do *V.Charlot* substrekis, ke en tiu komento de PK pri referendumo estis ankaŭ propono al kamaradoj doni solvon de problemoj kiuj aperas kaj li invitis pridiskuti tion en kongreso post la pritraktado de la raporto de PK.

Prezidanto de la PK, *Y.Peyraut*, proponis, ke la kongreso aprobu aŭ ne, la parton de la raporto, ĉar postaj temoj ne plu estas ligitaj al la laboro de PK. Kongreso aprobis la raporton per voĉdonado: kontraŭ neniu, sindetenoj du, ĉiuj aliaj por.

La sekva temo de la kunsido estis **Membraro**.

K-ino *T.Sabatier*, la kasistino de SAT, diris, ke en SAT ni ne estas sufiĉe nombraj.

K-do *Barkoviĉ* aldonis, ke antaŭ tri jaroj en SAT estis preskaŭ 2 mil membroj. Subita falo kaŭzas, ke nun en la tutmonda asocio estas 917-920 membroj. Alveno de la novaj membroj estas nesufiĉa kaj daŭre alvenas la sciigoj pri la mortoj de anoj. La membraro falas ankaŭ pro tio, ke multaj membroj ne plu pagas sian kotizon. Li diris, ke tiu problemo estas daŭra kaj invitis kongresanojn pridiskuti la problemon kaj trovi solvojn kiel varbi novajn membrojn por la asocio.

S-ro *D.Rooke* diris, ke li havas amikon en Alĝerio kaj tiu amiko asertas, ke SAT-kotizo estas tro alta por li. Ankaŭ mem s-ro *D. Rooke* ne estas membro de SAT, ĉar li ne vidas klare la celon de SAT. Li legas la gazeton kaj li aŭdis pri la kultura agado, pri iuj nebulaj esperoj, sed kulturaj celoj por li estas tro nebulaj.

Prezidanto de la kunveno *G.Ledon* opinis, ke por kompreni celojn de SAT ekzistas la Statuto kiu estas tre klara.

S-ro *D.Rooke* respondis, ke tio estas klara por aliaj, sed ne por li kaj G.Ledon ironie konsentis, ke tiel povas esti, ĉar Statuto ne estas ilustrita.

S-ino *A.Montesinos* diris, ke ŝi ne havas solvon kiel varbi membrojn por SAT, sed ŝi promesis, ke post kelkaj minutoj SAT havos novan membron. La decidon de s-ino A.Montesinos kongresanoj akceptis kun aplaŭdo.

K-do *R.Ballaguy* diris, ke en Moskva kongreso tiu temo jam estis longe pridiskutata kaj evidentiĝis, ke SAT ne estas sufiĉe alloga, ĉar SAT restas sur la kajo kaj la moderna trajno riskas foriri sen ni. R.Ballaguy opinias, ke ni devas vidi kie estas la progresemuloj, ĉar estas novaj movadoj kiuj antaŭeniras. Ekzemple en la semajno de la kongreso en Italio, en Ĝenovo kolektiĝos 155 mil homoj por kontraŭi la kunvenon de la gvidantoj el la 8 plej grandaj kaj potencaj ŝtatoj. Nome en tiuj vicoj de homoj kiuj estas kontraŭ la tutmondiĝo devas agi esperantistoj. Tio estas solvo por varbado kaj tio dependas de ni.

K-ino *M.Tahira* sciigis, ke SAT-peranto por Japanio dum la naciaj kongresoj kolektas SAT membrojn kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis pri SAT ricevas tie informojn. Tiamaniere la membraro iomete kreskas kaj parolantino opinias, ke por varbi oni devas unue informi.


K-do *V. Charlot* konfirmis, ke tiu problemo estas grandega kaj fundamenta por nia asocio, kaj ni devas trovi la solvon por savi SAT. Li alvokis ne reveni al kelkaj diskutoj, ĉar tio ne ebligos novajn solvojn: li diris, ke li havas kelkajn diverĝojn kun Y.Peyraut, pasintajn kaj venontajn, sed tio ne solvos la problemon pri savado de asocio. Li konsentis, ke propono de R.Ballaguy malfermi SAT por la ekstera mondo, estas bona vojo al la varbado. Li diris, ke engaĝiĝi al la batalo kontraŭ la liberala tutmondiĝo estas tasko de la esperantista asocio, ĉar tio estas vere internacia, sennacia kaj eĉ sennnacieca movado. V.Charlot ankaŭ esprimis sian aprobon, ke Y.Peyraut partoptrenis en la Unua internacia kongreso kontraŭ la mortpuno en Strasburgo kaj povis kontaktiĝi kun internaciaj kaj junaj organizoj. Li proponis, ke inter esperantistoj SAT agu sendante al ĉiuj esperantistaj asocioj informojn pri ĉiuj asociaj agadoj. Li finis per la konkludo, ke nun li estas multe pli optimisma pri la sorto de SAT ol antaŭ kelkaj monatoj.

K-do *Barkoviĉ* konsentis kun V.Charlot. Li nur memorigis, ke SAT estas laborista - esperanto movado kaj membro povas esti nur esperantisto. Tio signifas, ke se SAT agas inter la neesperantista mondo, ni ne povas atendi, ke de tie venos novaj

membroj. Unue ni devus esperantigi homojn, sed tio estas la laboro de LEA-oj. Ĝenerala sekretario konsentis, ke iri al tiuj neesperantistaj rondoj estas utile, ke en Sennaciulo oni povas skribi, ke inter 155 mil manifestantoj estis unu SAT-ano, sed li ne vidas tion kiel solvon por varbi novajn membrojn.

K-ino *A.Montesinos* volis diri, ke laŭ ŝia memoro, en Montpeliero okazis la SAT kunveno, kaj tio multe helpas en varbado, ĉar antaŭe SAT kaj UEA estis tre apartaj kaj por multaj esperantistoj SAT estis io aparta. Ŝi pensas, ke M.Tahira pravas, ke pri SAT oni devas paroli en la ĉiutaga vivo de la Esperanto movado.

K-ino *F.Toubale* precizigis, ke la unuan fojon SAT kunveno dum UK okazis en Adelaido. Nun, en la someraj kursoj en Aŭstralio ankaŭ okazas SAT kunvenoj kaj al ĉi-jaraj kursoj venis kelkaj junuloj kiuj esperantistiĝis dank' al projekto Indiĝenaj dialogoj kaj ili tre interesiĝis pri SAT. Tamen kun ili estas tre malfacile komuniki kaj ili malaperis. Dum la restado en Vietnamio, F.Toubale konstatis, ke SAT tute ne estis menciita en la libro kiu prezentas diversajn E-asociojn. F.Toubale parolis pri tio kun respondeculino kaj ricevis la promeson ke al libro estos donita suplemento. Tamen ŝi avertis, ke Vietnamio ne estas riĉa lando, do tio apenaŭ estus plibonigo de la stato de SAT.



K-do Ballaguy prezentas la problemon de tutmondiĝo
Fotis: R. Bouchet

K-do *V.Lutermano* emfazis per ripetado, ke principo, ke SAT ne varbas por esperanto, ke tio estas la taskoj de LEA-oj, fakte, estas la perdo de la eblecoj por SAT. Li opinias, ke SAT kiel ideo, kiel teorio estas tre alloga kaj necesa, ke estus domaĝe se SAT ne estus videbla al la ekstera mondo. Li opinias, ke esperantistoj, kiuj jam lernis lingvon ne estas sola solvo, povus esti inverse, ke homoj povas veni de SAT al esperanto, ĉar SAT estas valoro en si mem kiun oni devas prezenti ankaŭ en manifestacioj.

K-do *M. Hardy* diris, ke SAT ne povas agi rekte en la neesperantista mondo, sed LEA povas labori, agi por SAT kaj faras tion. Li informis, ke la 6-an de oktobro 2001 estiĝos en Orienta Francio la translima manifestacio kontraŭ la novliberalismo. En tiu manifestado estos francaj, luksemburgiaj, germanaj manifestantoj, estos starigitaj budoj kaj tio estas favora okazo por SAT-amikaro prezenti al ili SAT.

S-ro *P.Miles* konfesis, ke iam li estis membro de SATEB en Britio, eĉ komitatano, sed iom post iom li konstatis, ke SAT kaj li ne estas kongruaj. La kialon li vidas jam en la nomoj de asocio kaj organo kiuj komenciĝas per negativo. Li proponis pli pozitivan nomon, ekzemple, Mondcivitano. Li ankaŭ konstatis, ke en Sennnaciulo oni primokis homojn kiujn oni povas nomi kapitalistoj. Laŭ parolanto en la mondo ekzistas multaj pirataj kapitalistoj, sed ekzistas ankaŭ honestaj kapitalistoj. Ankaŭ li kun la edzino laboris dum multaj jaroj kiel kapitalistoj, sed ili laboris honeste kaj ne iĝis riĉaj, ĉar iliaj laboristoj estis pli bone pagitaj ol li kiel direktoro. Li reklamis sian entreprenon en la jarlibro de UEA por subteni UEA. P.Miles aldonis, ke li ankaŭ seniliuziĝis pri tiuj kiuj nomis sin komunistoj, ĉar ĉiuj scias, ke komunismo neniam okazis. Tielnomataj komunistoj simple poluciis tiun nomon, misuzis tion kaj koruptigis la tutan koncepton de tiu idealisma sociala fenomeno.

K-ino *A. Houlgatte* opinias, ke al SAT oni aliĝas pro ideoj. Oni lernas Esperanton kaj tio estas najbara al la idealoj de SAT, sed ne la sama. Do al SAT devus veni esperantistoj kiuj sentas sin proksimaj al SAT ideoj. En Francio ŝi konas kelkajn personojn kiuj pagas du kotizojn: por SAT kaj por SAT-amikaro. Tio estas peza afero eĉ en Francio. Ŝi komentis ankaŭ vortojn de P.Miles, dirante, ke en SAT ne estas nur komunistoj, sed ankaŭ sen politikaj ideoj homoj komunikiĝas. Ŝi tamen pensas, ke malgraŭ la ekzisto de SAT-Statuto multaj ideoj ne estas klaraj.

K-do *G. Mickle* volis averti kontraŭ tio, ke oni ne havu grandajn esperojn rilate al membro kreskiĝo. Li bedaŭras, sed konstatas, ke nuntempe homoj pli kaj pli rezignas je tradiciaj Esperanto asocioj, je membreco en ili. Okazas, ke uzado de Interneto, precipe inter junaj homoj, ebligas lerni la lingvon kaj uzi ĝin sen abonado de revuoj, aliĝo al asocioj, ĉar en la reto oni trovas ĉiujn necesajn informojn. Estas tre malfacile varbi homojn por asocio. Do parolanto petis, ke ne demoraliziĝu, se esperoj pri la kreskiĝo de la membraro ne realiĝos. Li komprenas pri financaj problemoj, sed eble oni devas pripensi aliajn vojojn, ekzemple, celigitaj donacoj por certaj celoj. Eble tiam SAT povus pluvivi eĉ kun limigita membraro.

K-ino *T.Kapista* volis respondi al D.Rooke, kiu diris, ke li ne komprenas idealojn de SAT malgraŭ la Statuto. Ŝi diris, ke kvankam ŝi studis juron, ankaŭ ŝi momente ne komprenas tion, ĉar antaŭe ĉio estis klare: estis kapitalisto, estis laboristo kaj estis sindikato kiu defendis la laboriston. Nun, almenaŭ en Jugoslavio (legu Serbio), ŝia lando, ĉio ŝanĝiĝis. Ekzemple, en lando estas grupo de 17 homoj, fakuloj, teknokratoj, bankistoj, ekonomiistoj kiuj nomiĝas grupo G17. Tiu grupo estas memstara organizo, ekster parlamento. Tiu grupo de fakuloj, konsilis vendi la cementfabrikon al Italio, kiu nun laboras profitodone. Al la demando kial oni vendu bone funkciantan fabrikon, la respondo estis, ke tiu lando donis la monhelpon, do ĝi devas ricevi la fabrikon! Kaj neniu demandas la laboristojn kion ili opinias. Do, laŭ konkludo de T.Kapista ne plu ekzistas la klasbatalo, ekzistas la registaro kaj ĉiuj aliaj. Same, se oni parolas pri policistoj kiuj multege laboris dum bombardado kaj cetere multe deĵoris kontraŭ la malgranda salajro. Ĉar ili pensis, ke nun jam ekzistas vera demokratio ili decidis fondi liberan sindikaton. Ili strikis petante pli altan salajron, sed jam duan tagon la tuta gvidantaro de tiu libera sindikato estis enkancerigita kaj la afero finita. Do, k-ino T.Kapista diris, ke nun tute ne plu estas klara kio estas tiuj laboristaj rajtoj, ĉar en tiu nova Eŭropo ŝi sentas sin iom perdita.

K-do *R.Pontnau* pensas, ke laborista asocio estas bezonata. Li ne emis diskuti pri la taŭgeco de la vorto kamarado kaj la nomo de la asocio, kiun li ne volus ŝanĝi, sed li volis havi du precizigojn: la unua, ĉu oni antaŭvidas iun propagandan agadon de SAT en Zagrebo dum UK? La dua afero estas, ke en Francio ekzistas SAT-Amikaro kaj en tiu LEA estas sufiĉe multaj membroj. SAT-Amikara kongreso arigas ĝis 300 partoprenantoj, do pli ol nuna kongreso, tamen multaj SAT-amikaranoj ne aliĝas al SAT kaj oni devus agi en tiu direkto

K-do *R. Blow* diris, ke al li ŝajnas, ke tio estas vera problemo, ĉar Esperantio estas malgranda kaj ne eblas tie multajn varbi. Do, la LEA-oj necese devas agi inter la novaj movaduloj kiel la movado kontraŭ liberala tutmondiĝo k.t.p. Li mem estas anarkiista komunisto kaj kvankam eble ne plu ekzistas la klasbatalo, li rimarkas, ke la mastro maldungas lin.

K-ino *N.Arolovič* proponis por subteno de SAT diferencigi la kotizojn, ĉar esperantistoj el pli riĉaj landoj povas pagi iom pli ol tiuj de nepagipovaj landoj kiel Afriko aŭ Rusio, kvankam en Rusio jam estas homoj kiuj povas pagi pli. Ŝi ankaŭ sugestis, ke pli riĉaj esperantistoj pagu la kotizon por siaj geamikoj de nepagipovaj landoj. Ŝi ankaŭ proponis, ke eble valorus organizi fonduson kiu subtenus SAT, ĉar eble inter esperantistoj estas mecenatoj, riĉuloj kiuj povus simple donaci grandan monon al SAT, aŭ eble estas riĉaj personoj aŭ organizaĵoj kiuj favore rilatus al Esperanto kaj povus donaci iun monon al SAT. Ŝi komprenas, ke SAT estas laborista organizaĵo kaj tie estas multaj komunistoj, anarkiistoj, socialistoj k.t.p., sed en Rusio nuntempe laboristoj estas pli riĉaj ol sciencistoj kaj kulturagantoj. Ŝi proponis kunlabori krom la organizaĵoj homrajtaj ankaŭ kun kultu-

raj organizaĵoj, ĉar fakte sen kulturo neniu asocio povas ekzisti kaj evolui antaŭen. Des pli, ke kulturaj organizaĵoj certe povas ekdeziri lerni Esperanton, iĝi esperantistoj kaj subteni SAT kaj Esperanton.

K-ino *M.Tahira* rakontis al ĉeestantoj pri sia amiko anarkiisto, kiu ne estas esperantisto, sed ege interesiĝis pri sennaciismo kaj post unu jaro li ŝatus partopreni en SAT kongreso. Li proponis al M.Tahira organizi E-kurson en anarkiista grupo kun espero, ke li lernos Esperanton kaj povos diskuti. M.Tahira trovas, ke tio estas bona vojo, ĉar japanoj havas monon, sed por japanoj estas malfacile bone lerni Esperanton kaj por diskutado oni bezonas bonan lingvan nivelon.


Junulinoj de Nagykanizsa dancis por ni
Fotis: R. Bouchet

K-do *J.Schram* konstatis, ke li apartenas al multaj asocioj kaj li ankaŭ multe manifestaciis kontraŭ la malbonaj kapitalistoj. En tiuj manifestacioj li vidis esperantistojn kaj SAT-anojn. Li en ĉiuj tiuj aferoj povis partopreni kiel SAT-ano, sed ne kiel SAT. Li aldonis, ke post kelkaj tagoj de lia unua kongreso li tre bedaŭras, ke en Nederlando FLE ne plu ekzistas kaj li opinias, ke tio estas granda eraro, eĉ la eraro de la jarcento.

K-do *G.Ledon* parolis kiel peranto de SAT en Brazilio. La problemo de Sudameriko estas, ke tie ne estas multaj SAT-anoj. En Brazilio estas iom pli, sed aparta fenomeno estas, ke ili estas spiritistoj. Kaj kiam G.Ledon alparolas esperantistojn tie, venas la demando ĉu la religiuloj povas eniri SAT. G.Ledon ĉiam respondas jes, sed prefere ne, ĉar li opinias ke ilia spiritismo ne kongruas kun la ideoj de SAT. Pro tio, laŭ parolanto, ni ne havas membrojn de Irano kaj Irako, aŭ de aliaj landoj tie, ĉar fanatikismo de la religioj ne permesas, ke ili atingu la SAT ideojn. Ili ne volas kleriĝi, sed volas fermi la rigardon al la dogmoj. Kiu estas dogmema, religiema, tiu ne facile eniras SAT kaj se eniras ĝin ne povas tie resti. Do, li konkludis la rezulton, ke en Sudameriko pro ideologiaj bariloj oni ne povas arigi multajn SAT membrojn kaj tiuj kiuj estas, preskaŭ ĉiuj estas spiritistoj. Tio ne estas ĝena, ĉar oni povas esti spiritisto kaj koncepti iun mondon sennacieca, ĉar laŭ teorio de spiritistoj la tuta mondo estas ĉi tie, do oni devas havi komunan komunikilon, eble Esperanton. Kaj eĉ spiritistoj diris, ke la spirito de Zamenhof estis jam en la mondo de la spiritoj kiam sur la tero Zamenhof komencis krei la lingvon. Laŭ G.Ledon tio ne gravas. La afero estas, ke arigi homojn por nia movado estas malfacile, des pli, ke antaŭe oni devas fariĝi esperantisto. Sed nuntempe homoj eĉ ne klopodas lerni Esperanton, ĉar la malkulturo funkcias kaj homoj ne plu emas uzi tiun grizan materialon kiu estas en la kapo. Ĉe la fino, G.Ledon konkludis, ke pro tio nia movado ne antaŭeniras.

Prezidanto de la PK de SAT, *Y.Peyraut*, parolante pri solvoj kiel varbi novajn membrojn denove revenis al Sennaciulo kiel montrofenestro de nia asocio. La fakto, ke ĝi pliriĉiĝis, dependas de tri fenomenoj: unue, ke venis multaj reagoj pri tutmondiĝo, due, la fakto, ke en diversaj kongresoj okazis kunvenoj de SAT. Li memoris la kunvenojn en Berlino kaj Montpeliero kaj multajn en SAT-amikaraj kongresoj. En Montpeliero venis 200 personoj kiuj interesiĝis pri SAT, sed oni daŭre atendas la unuan membron. Dum kongreso de SAT-Amikaro en Chambery, kiun gvidis Y.Peyraut kaj V.Markov, ĉeestis nur 5 personoj el kiuj 2 aliĝis. Li konstatis, ke la membraro de UEA kaj SAT grandiĝas kaj malgrandiĝas paralele. Lastatempe li legis, ke membraro de UEA denove kreskas kaj li supozas, ke tio faros pozitivan influon ankaŭ al la membraro de SAT. Li ankaŭ klarigis, ke se de multaj jaroj tre malavaraj gekamaradoj ne donacus al SAT, tiam SAT ne plu ekzistus tia kia ĝi estas nun. Li konkludis, ke ni jam vivas per donacoj. Kaj ĉe la fino respondante al T.Kapista pri klasbatalo li citis la frazon de SATano, k-do P.Levy: “Fakte ne plu ekzistas la klasbatalo, sed oni forgesis pri tio informi mian mastron”.

K-do *R.Ballaguy* reagante al al vortoj de K.Barkoviĉ kaj G.Ledon, ke unue oni devas esti esperantisto kaj poste aliĝi al SAT, diris, ke laŭ li, oni devas varbi al SAT ĉie. Li spertis, ke kiam li manifestaciis kun banderolo, venis multaj homoj kiuj interesiĝis. En tiuj medioj kie oni manifestacias ĉiam estas homoj kiuj serĉas alian aferon, al kiuj oni povas proponi SAT kiel bonan ideon, bonan rimedon, bonan idealon. Li diris, ke li demandas sin ĉu lia loko estas en SAT. Li petis montri la artikolon en la Statuto kiu postulu, ke SAT membro estu klera kaj nereligiema. Li mem estas diokredanto kaj en SAT ĝis nun sentas sin bone akceptata. Li bedaŭris, ke kelkfoje stulte kaj mallerte en SAT oni estas kontraŭ religio. Li konsentas, ke oni estu kontraŭ la klerikuloj, la povuloj kiuj uzas la religion kiel premon sur la homoj, sed ke oni estu kontraŭ la religio tion li ne akceptas kaj demandas ĉu en tiu kazo li estas akceptata.

K-do *G.Ledon* reagis dirante, ke ŝajnas, ke demando estas direktita al li kaj li diras, ke religio per si mem ne kontraŭas la raciecon de SAT, sed la mistikismo kontraŭas la raciecon de SAT, almenaŭ laŭ la vidpunkto de SAT.

K-do *Y.Peyraut* nur volis aldoni, ke posttagmeze devus prelegi R.Ballaguy, sed ili decidis kunfandi la prelegon de R.Ballaguy kaj tiun de Y.Peyraut kaj paroli pri tutmondiĝo. Li proponis fari la forumon kie ĉiu povos doni sian opinion kaj tio siavice povos doni la ideojn por Gvidrezolucio.

K-ino *A.Montesinos* komentis la ideon pri riĉaj kaj malriĉaj landoj per klarigo, ke ne ĉiuj homoj de riĉaj landoj havas sufiĉe da mono. Ŝi tamen konsentas, ke ĉiu kiu volas, povas doni la monon por aligi alian personon. Reagante al temo pri diokredantoj, ŝi rimarkis, ke fanatikuloj ĉie estas problemaj, sed esenca kredanto ne povas esti problemo. Al la vortoj de P.Miles pri bonaj kaj malbonaj kapitalistoj ŝi diris, ke kapitalismo kiel sistemo bezonas grupon kiu devas esti ekspluatata. Do la sistemo estas esence maljusta, sed la idealo de komunismo estas, ke ni ĉiuj estas egalrajtaj do sistemo estas esence justa.

K-ino Z.*Stoilova* ne volis paroli pri politika kaj ekonomia situacio de Bulgario, sed volis diri, ke jam kelkajn jarojn ŝian kotizon kaj abonon pagadas amiko A.Legros kaj jam kelkajn jarojn ŝi povas kongresi dank al F.Toubale kiu pagas la kongresan restadon. Do, k-ino Z. Stoilova uzis la okazon elkore danki al ili.

K-do *R.Prevost* volis reagi al la vortoj de R.Ballaguy, pri manifestacioj. Li diris, ke en manifestacioj li ankaŭ partoprenis, do li konsilis manifestacii grupe, ĉar sole oni estas nenio eĉ kun banderolo. Almenaŭ unu devas foti por ĵurnalistoj.

K-do *R.Ballaguy* interrompis la parolanton dirante, ke li ne bezonas konsilojn kiel manifestacii, kaj prezidanto de la kunveno konkludis, ke tio estas ekster la temo, do ne povas esti daŭrigata.

Ĝenerala sekretario de SAT, k-do *Barkoviĉ*, parolis pri la kotizoj kaj diris, ke ili provas aranĝi la kotizojn laŭ la ekonomia nivelo de la lando. Li konsentas, ke oni neniam povas esti justa tiel, ke ĉiuj estu kontentaj, tamen en SAT oni povas aranĝi, trovi solvon, se homo deziras esti membro. Eĉ la plej malriĉaj tamen devas pagi almenaŭ iomete por montri sian deziron esti en SAT. Ĉe ni ekzistas duonaj kotizoj por pensiuloj, junuloj, senlaboruloj kaj tio ne estas en multaj asocioj. Ankaŭ parolante pri Rusio li diris, ke post falo de muro estis multegaj membroj kaj nun estas tre malmultaj. La plena kotizo estas 7 usonaj dolaroj kaj 3,5 por malriĉuloj kaj tio ne povas esti kaŭzo de malaliĝoj. Estas io alia kaj tiun alian ni devas trovi. Li ankaŭ petis tiujn ĉeestantojn en la salono, kiuj ne estas SAT-anoj pro tro altaj kotizoj veni al li kaj la afero estos solvita.

Sekva temo de la kunveno estis **Administrado**. Neniu

parolis, do prezidanto de la kunveno proponis transiri al la alia temo, **Rilatoj kun TANEF.**

K-ino *S. de Weerd* memorigis, ke tion ŝi jam aludis dum la malferma kunsido kaj ŝi nur volis aldoni, ke ĵaŭde dum la prelego de T.Auderskaja ankaŭ TANEF-anoj estos tie kaj povos doni klarigojn al tiuj kiuj interesiĝas pri TANEF movado.

La sekva temo de la kunsido estis **Konfliktkomisiono**. K-do *J.Schram* diris, ke al li estas iom malklara la afero, ĉar pli frue k-do P.Persson estis la sekretario de K.K. kaj J.Schram nun estas la sekretario de Ĝenerala Konsilantaro, do laŭ la Statuto, li ankaŭ estas la sekretario de Konfliktkomisiono. Sed laŭ artikolo en Sennaciulo li ne plu komprenas, ĉu li estas la sekretario de K.K., aŭ estas ŝanĝo en la Statuto, aŭ tiu K.K. ne plu ekzistas.



Parto de la kongresanoj atendante komenciĝon de laborkunsido

Fotis: R. Bouchet

K-do *K.Barkoviĉ* respondis, ke ĝis nun ne okazis konfliktoj, do komisiono ne havis la laboron. Sed tio ne signifas, ke ĝin oni ne bezonos en estonteco. Do en kongreso oni devas elekti K.K. por la periodo ĝis la venonta kongreso. Laŭ la Statuto tio devas esti la personoj de la sama loko, sed nun pro la reto tio ne plu estas deviga. KK devos agi en la kazo de la konflikto inter SAT-anoj aŭ PK kaj SAT-anoj. K. Barkoviĉ proponis, ke J.Schram estu la sekretario de K.K. kaj li petis aliajn du personojn kiuj povus agi kiel K.K. en la kazo de neceso. Unuanime al K.K. krom J.Schram estis elektitaj ankaŭ kamaradoj M.Bustin kaj A.Prent.

K-do *V. Charlot* proponis, ke kongreso la venontan temon Ĝenerala Konsilantaro pritraktu dum la venonta kunveno, ĉar alproksimiĝis la tempo por tagmanĝi, sed nun oni rapide priparolu la temon **Landaj Perantoj** ĉar temo Ĝenerala Konsilantaro estas pli vasta.

K-ino *F.Toubale* diris, ke PK ne plu havas la kontakton kun la peranto de Bulgario, sed kongreson ĉeestas bulgarino Z.Stoilova kaj eble ŝi povas doni iujn informojn pri tio.

K-ino *Z.Stoilova* diris, ke ŝi nur scias, ke k-do G.Damjanov jam estas maljuna kaj malsana. Lia filino, S.Damjanova zorgas pri kaj, verŝajne, pro la manko de mono ne povas ĉeesti la kongreson, sed pli da detaloj Z.Stoilova ne scias kaj ne povas diri.

K-do *J.Schram* proponis, ke la landaj perantoj kiel eblas pli multe kontaktu unu la alian kaj transdonu informojn kiamaniere oni agas en propraj landoj. Li diris, ke li havas la amikon tre spertan en varbaj tekstoj kiujn oni povus uzi, adaptigi al propraj landoj. Li diris, ke nun la perantoj apenaŭ havas kontakton unu kun la alia.

K-do *K.Barkoviĉ* diris, ke tio estas vero, kaj li demandis ĉu Z.Stoilova akceptus esti perantino por Bulgario, se evidentiĝos, ke aktuala peranto ne plu povas aktivi.

Z Stoilova dubis, ĉu ŝi estas preta por tio.

K-do *A.Prent* konstatis, ke inter la perantoj estas divido: tiuj kiuj estas sendependaj kaj solaj kaj aliaj kiuj havas la subtenon de LEA-oj. Li kontentis, ke ideo de J.Schram sendi informilojn estas ĝenerale utila ne nur por perantoj, sed ankaŭ por LEA-oj kaj LEA-oj devus pripensi, ke se iu kreas informilon kiu estas ĝenerala, ne nur por la loka lando eble ĝi povas esti utila en aliaj partoj de la mondo.

K-do *G.Ledon* kiel peranto por Brazilio aldonis, ke en la tuta mondo krom Eŭropo, la vorto LEA estas ne konata, ĉar ne ekzistas similaj organizaĵoj en tiel nomata tria mondo.

Ĉar temo Landaj perantoj estis finita, prezidanto de la kunveno G.Ledon demandis ĉu iu havus ankoraŭ rimarkojn laŭ la temo **Sennaciulo** kiu estis pritraktita iom pli frue.

K-do *M.Bustin* demandis ĉu la raportojn de PK kunvenoj ne eblas publikigi en la Sennaciulo.

K-do *K.Barkoviĉ* respondis, ke ĉio eblas. La PK kunvenas dufoje dum la monato, do en Sennaciulo oni devus trovi lokon por du raportoj kiuj jam estas sendataj al ĝeneralaj konsilantoj. Tion proponis la PK, ĉar Ĝ.K. volis scii kion oni pritraktas. Li diris, ke protokolo estas ĉiam mane skribita post la kunveno kaj dum alia kunveno la protokolo estas laŭte legata post kio PK aprobas kaj subskribas ĝin. Ĝenerala sekretario kunportis la kopion de lasta protokolo, de la kunveno de 27a de junio, en la kazo se tio interesos kongresanojn. Post la tralego de la teksto li demandis ĉu iu el la kongresanoj ŝatus legi tion en Sennnaciulo, ĉar li timas, ke tio nur prenus la spacon de gazeto, sed neniu tion legus.

K-do *Y.Peyraut* komentis, ke tio eble interesus kelkajn personojn, sed praktike pri ĉiuj punktoj kiujn oni priparolas dum PK tuj aperas artikoloj en Sennaciulo, escepte la temo la riparo de la necesejo, do publikigo de la protokolo estus duoblaĵo kaj legantoj dufoje legus la samon. Li insistis pri la fakto, ke PK mem decidis, proponis kaj sendas kopiojn al Ĝ.K. kaj tiuj protokoloj estas en la sidejo ekde jaro 1911 (eĉ de la antaŭulo de SAT).

S-ro *D. Rooke* diris, ke li ne estas membro de SAT, sed lia artikolo aperis en Sennaciulo kaj pri tio li miras. Li havis la demandon ĉu ekzistas cenzuro en tiu gazeto.

K-do *Barkoviĉ* diris, ke cenzuro ne ekzistas, krom se estas vere personaj atakoj kaj, verŝajne, estis la eraro publikigo de teksto pri N.Bartelmes, ĉar ĝi provokis problemojn. En Sennaciulo oni aperigas artikolon sendepende de tio ĉu skribis SAT membro aŭ ne, kondiĉe, ke la materialo estas interesa. La gazeto estas malfermita organo de asocio kaj tekstoj subskribitaj de PK estas oficialaj, dum ĉio alia estas la kontribuaĵoj de membroj kaj nemembroj kiuj legas ĝin kaj kontribuas per interesaj artikoloj.

K-do *G. Ledon* intervenis dirante, ke li estas rekte envolvita en la afero. Li opinias, ke SAT-anoj devas malfermi sian horizonton kaj en klerigado distingi la punktojn kiuj estas malrespektaj, kalumniaj, insultaj k.t.p. Do, li faris provokon en la artikolo kaj nun li estas kondamnita eĉ de UEA. Li havas teruran dosieron kie lin kondamnas SAT-anoj kaj eĉ miskondamnas, ke li estas mensogulo. Li ne akceptas tion, ĉar li konfesas, ke li povas kalumnii, insulti, ĉar tio estas la interpretado en la vortoj, en la konceptoj. Estas psikologia sinteno ĉe la homoj, ke ili sentas sin ofenditaj, se ili ricevas ideojn kun kiuj ili ne kongruas. G.Ledon diris, ke en tiu amuza epizodo rilate al N.Bartelmes, (kiun li bone konis kaj estimis, kiu portis mallongan pantalonon, proksimiĝis al infanoj, skribis libron pri infanoj k.t.p.), li provoke skribis, ke se li tion farus nuntempe oni dirus, ke li estas pedofilo. Tio estis la provoko kiun sekvis la amaso de reagoj kun ĉiuj insultaj vortoj. Li opinias, ke li povas en SAT fari tion por malfermi la horizonton, al kiu ni ne povas fermiĝi. Li ne scias ĉu aperos en Sennaciulo lia reago kiun li donis al la tuta afero.

K-do *V.Lutermano* proponis esti laŭeble preciza kaj honesta kiam iu diras, ke ne okazas cenzuro. Li akceptas, ke ne plu okazas, ĉar antaŭ du jaroj en Sennaciulo ne aperis teksto, ĉar Y.Peyraut koleris pri ĝi. Li esperas, ke tio ne plu okazas. Li diras, ke raportoj de PK kunvenoj devas esti alireblaj al ĉiuj SAT-anoj. V.Lutermano proponis, ke se iu bezonas tekston petu ĝin ĉe Ĝenerala Konsilantaro aŭ rekte ĉe PK rete. Parolanto mem asertis, ke en sidejo K.Barkoviĉ jam havas tro da laboro, do ne eblas meti tion en la reton, sed se iu nepre bezonas, tiu rajtas ricevi la fotokopion.

K-do *K.Barkoviĉ* konsentis, ke tio eblas, ĉar tio estas nenia sekreto. Tio estas granda libro kiu troviĝas en sidejo kaj estas publike disponebla por ĉiuj vizitantoj kaj ĝeneralaj konsilantoj tion ricevadas.

Per tio finiĝis la dua laborkunsido.

TRIA LABORKUNSIDO

Prezidas k-do *Nikolao Gudskov*- transdonas la vorton al k-do *Barkoviĉ*, kiu estis kiel observanto kaj kiu rakontis kio estas la civito, kiel ĝi fondiĝis, kiu estos la imperiestro de la Civito ktp.

Esperanto-Civito : K-do *Barkoviĉ* akceptas honeste prezenti la aferon kaj opinias ke ne estas bone moki pri io kio ankoraŭ ne estas definitive starigita kaj oni ne scias kiel ĝi funkcios kaj ĉu entute ĝi funkcios. Ĉiakaze ĝi ne estas pli ridinda ol multaj aliaj aferoj kiuj ekzistas en Esperanto-movado. Ĉiu el la ĉeestantoj ricevis informon presitan pri la Pakto de E-Civito. Dum la kunveno en Sabloneto la fondintoj de la Pakto adoptis la Ĉarton de Sabloneto (de la Civito), kiu estis oficiale registrita en la urbodomo de Sabloneto. Laŭ la reguloj de la E-Civito, ĉiu esperantisto povas peti la civitanecon individue, kondiĉe ke li estu membro de iu asocio kiu aliĝis al la Pakto, aŭ abonanto de iu gazeto kies redakcio aliĝis al la Pakto. Kio koncernas SAT, oni proponis ke SAT aliĝu al la Pakto, kaj se ĝi mem kiel Asocio ne volas, ke la redakcio de Sennaciulo aŭ de Sennacieca Revuo aliĝu al la Pakto. Tiamaniere ĉiuj SAT-anoj kaj abonantoj de niaj gazetoj havus la rajton peti civitanecon. Do, la demando pri kiu oni devus voĉdoni estas: ĉu SAT aliĝu al la Pakto aŭ ne, ĉu iu el niaj du redakcioj (Sennaciulo, S.R.) aliĝu al la Pakto aŭ ne? K-do Barkoviĉ persone opinias ke SAT ne aliĝu, por ke ĝi povu resti absolute sendependa. Sed pri la aliĝo de la redakcioj li estas favora, ĉar tiel oni ebligas al niaj membroj peti la civitanecon. Unue oni pridiskutu.



Niaj aŭstraliaj gekamaradoj bonege aktoris

Fotis: R. Bouchet

K-do *Gudskov* demandas kiom da personoj ricevas rete «Heroldo Komunikas». En la lasta numero aperis teksto dediĉita speciale al nia kongreso ĉi tie. En ĝi estis konkludo, ke se SAT volas transvivi, ĝia sola solvo estas aliĝi al la Pakto (kvankam en si mem ĝi estas tre favora al SAT). K-do Charlot estas mirigita, ke Kreŝo ne legis, ke en Pakto (la teksto), en la deka punkto estas dirite ke el la pakto oni povas retiriĝi pro unu el la subaj kialoj: 1. Pruvita malfondo de establo (Asocio); 2. Verdikto de la arbitracia instanco, Kortumo, kiu ekzamenis la peton de la koncerna establo. Tio signifas ke se ni volus retiriĝi, ni devus iri al iu Kortumo. La Kortumo donas verdikton kaj la verdikto ne estas apelaciebla. Tio signifas ke se ni aliĝus, ni ne povus libere retiriĝi. Ni devus iri al mi ne scias kiu kortumo, kiu ne estas de SAT. Kaj SAT estus limigita, same redakcioj de niaj gazetoj. Mi havus aliajn komentojn, sed jam pro tio mi absolute rifuzas aliĝi.

K-do *A. Prent* konstatas ke individuaj esperantistoj ne rajtas aliĝi sed ili devas esti membroj de iu aliĝinta asocio aŭ redakcio. Tio ne estas bona afero. Mi kontraŭas ne ke SAT daŭre sekvu la aferon, sed ke ĝi aliĝu. K-do *Ballaguy* proponas ke oni kreu novan frakcion pri E-civito, kiu aliĝus kaj tiel ebligus al SAT-anoj peti civitanecon. K-dino *Isabele Martinez* opinias ke oni kreu nenion novan. SAT devas esti ekster tiu afero. La membroj de SAT devas esti liberaj aliĝi aŭ ne. Vi ne devas respondeci pri ni nek ni pri vi. Tio devas esti individua afero kaj ne kadre de SAT. K-do *Lutermano* opinias kiel k-do Barkoviĉ ke oni ne afiŝu SAT en la aferon, nek Sennaciulon, sed oni trovu rimedon por ke la SAT-anoj povu peti civitanecon. Ekz. Redakcio de S.R. estas la plej malgranda implikiĝo en la afero.

K-do *Gudskov* atentigas ke jam povas peti civitanecon la abonantoj de Heroldo, de Literatura Foiro ktp. Do ĉar multaj SAT anoj abonas tiujn gazetojn, ili jam povas aliĝi.

K-do *Hardy*, opinias ke ni ne rajtas aligi nian Asocion al io ajn kio eble ne estas konforma al nia Statuto, ĉar per ĝi ni aligas niajn membrojn, kaj necesus referendumo por tion decidi.

K-do *Gary Mickle* ne samopinias kiel Lutermano ke SAT devus iamaniere ebligi al siaj membroj civitaniĝi. Se la Pakto deziras havi individuajn membrojn, ĝi ebligu tion per sia propra regularo. Kial ni devus per aliĝo tion ebligi al niaj membroj? Tio estas afero de la Civito kaj ne de SAT.

K-dino *Toubale* samopinias kiel Gary Mickle ke la ŝanĝo devas veni ne de ni sed de la Pakto. Ja, kiam ili konstatos ke tiel la afero ne funkcias ili mem eble ŝanĝos tion en sia regularo.

K-do *Djemil Kessous*, malkonsentas ke SAT kaj ĝiaj organoj aliĝu al tiu civito. Des pli ke nek Sennaciulo nek S.R. havas specifan statuson.

K-dino *de Weert* samopinias kun k-dino Martinez kaj tute kontraŭas la aliĝon al la Pakto. Ŝi ne komprenas kiel eĉ eblus la aliĝo de Sennaciulo aŭ S.R.

K-do *Krombeen* proponas forŝovi la aferon almenaŭ por unu jaro kaj nun li absolute kontraŭas la aliĝon de SAT aŭ de ĝiaj organoj.

K-do *Gudskov* informas ke la tuto komenciĝis jam antaŭ 21jaroj en Raŭmo dum la IJK, kiam estis akceptita tiu manifesto de Raŭmo. Tiam jam oni emfazis ke esperantistoj iom similas al iu diaspora etno. Sed se el esperantistoj oni komencas fari iun ŝtaton, iun civiton aŭ imperion, tio kontraŭas lian liberecanan spiriton kaj de ĉiuj liberecanoj de SAT.

K-dino *Nora Caragea* opinias ke ne estas bone ke SAT aŭ la redakcioj de SAT-gazetoj reprezentu iujn membrojn de SAT. Laŭ mi tiu Civito estus fiera esti kaptinta SAT kiel unu el la gravaj E-Asocioj. Due, ĉar la rilatoj kun UEA sufiĉe pliboniĝis, estus stulte malbonigi nun tiujn rilatojn. En la lasta numero de Esperanto aperis iom ironia sed tamen interesa artikolo de Detlev Blanke kaj tre plaĉis al mi la frazo: «Tiu organizo bezonas reĝon kaj ministron.». Jam oni scias kiu estas reĝo kaj ministro, sen indiki la nomon. Kiam oni volas retiriĝi, oni devas iri al la kortumo. Tiu regulo tre memorigas min pri «Atestantoj de Jehovo».

K-do *Suarez* opinias ke tiu afero havas nenion kun SAT. Li opinias ke ni devas esti sendependaj kaj kontraŭas al aliĝo de SAT kaj ĝiaj gazetoj.

K-dino *Isabela Martinez* eksiĝos el SAT se ŝia aliĝebleco al io ajn dependas de SAT. Ŝi volas esti kaj resti memstara.

K-do *Schram* indikas ke Georgo Kamaĉo antaŭ kelkaj jaroj aperigis broŝuron kontraŭ tiu pakto kaj esperanto-diasporo. Neniu kuraĝis eldoni ĝin kaj fine la Progresema E-Forumo el Antverpeno eldonis ĝin. Kiam vi legas ĝin estas certe ke vi neniam aliĝos al Pakto.

K-do *Barkoviĉ* finas la diskuton. Li indikas ke li mem estas kontraŭ la aliĝo de SAT, sed ne kontraŭ la aliĝo de redakcio de S.R. Evidente, tio estas lia propra opinio kaj la kongreso voĉdonos kiel ĝi volos. Due, estas tre bone ke la rilatoj kun UEA estas bonaj. Sed, se UEA ne plu volus havi bonajn rilatojn kun SAT ĉar SAT sendepende faras kion ĝi volas, tiam ni ne bezonas havi bonajn rilatojn kun UEA. Kio estas UEA? Unu el E-organizoj same kiel ni kaj kiel ĉiuj aliaj. Ĝi ne havas monopolon de Esperanto. Esperanto estas transdonita al esperantistoj kaj ne al UEA. Cetere, UEA eĉ ne ekzistis kiam okazis la Unua Kongreso de Esperanto (Universala Kongreso). Tiu kongreso en Zagrebo ne estas kongreso de UEA sed de Esperanto dum kiu kunvenas UEA kaj multaj aliaj E-Organizoj. Ĉar UEA estas la plej granda kaj plej potenca organizo, ĝi organizas ĝin.

Voĉdono:

1) Prokrasti la aferon ĝis venonta jaro - rifuzita per plimulto (5 por, 38 kontraŭ, sindeteno 10)

2). Aliĝo de SAT al la Pakto - por neniu, sindetenoj 5, kontraŭ 44.

3) Aliĝo de redakcio de Sennaciulo : por neniu, sindeteno 6, kontraŭ 46.

4) Aliĝo de redakcio de S.R. : por 3, sindetenoj 9, kontraŭ 34. Decidite sendi la leteron al la Pakto kun klarigo. La teksto de la letero aperos en Sennaciulo. La P.K. verkos ĝin.

Kasraporto

Ĉiuj havas en la manoj la kasraporton.

K-do *Gilbert Ledon* konstatas ke estas multaj donacoj. Li demandas sin ĉu Asocio kiel SAT devas nepre kalkuli pri donacoj por transvivi?

K-dino *Tereza Sabatier* respondas ke tio estas vero por la lasta jaro. Sed, kiom longe tiel estos. Se ni ne havos donacojn, ni devos maldungi nian laboriston.

K-do *Bustin* volas paroli pri PIV. Kiam aperos la nova, oni malpli vendos la malnovan kaj tio tamen estas kapitalo. Ĉu oni ne povus malaltigi la prezon de la malnova, por ke ĝi estu pli facile vendebla?

K-dino *Tereza* respondas ke post la apero de la nova oni malaltigos la prezon de la aktuala kaj rezervos ĝin por la landoj kiuj ne povis ĝis nun aĉeti ĝin. Pri tio decidos la P.K.

K-do *Theobald* volas scii pri la malbona financa situacio, ĉar tio ne aperas en la kasraporto? Same pri la socia kapitalo kiu malaltiĝis.?

K-dino *Tereza* respondas ke la disponebla mono estas de la 31-a de decembro kiam alvenas la kotizoj. Sed oni devas vivi la tutan jaron kaj pagi la salajron. Disponebla mono signifas nenion ĉar oni devas kompari kion oni posedas kun kion oni ŝuldas, kaj ĉefe en tiu dato. Pri la kapitalo, oni povas vidi ke ĉiujare oni perdas ĉirkaŭ 30000 FRF. Tio signifas ke estas malbona situacio, kiu iom post iom manĝas la kapitalon. Kio estas la kapitalo. Estas la domo, kiun SAT feliĉe posedas, sed ĝi ne estas luksa, eĉ male. La muroj estas malfortaj.

K-do *Theobald* demandas pri la sidejaj elspezoj.

K-dino *Tereza* respondas ke ĉiuj ŝarĝoj kiujn ni havas estas devigaj kaj ni ne povas eskapi. Ĉiuj kiuj deziras havi iajn respondojn povas skribi al la sidejo kaj oni respondos al ili.

K-do *Charlot* demandas kial oni ne apartigas la kotizojn kaj donacojn. Ĉu estas leĝa afero.

La respondo de k-dino *Tereza* estas ke ne estas leĝa, sed ĉiam estis tiel kaj tiel oni daŭrigas. La problemo estas ke en Eŭropo por ĉiuj vendoj, kiuj estas faritaj al individuoj, oni devas pagi imposton. La procento por la abono estas 2,1% sed kiam oni ricevas kotizon, oni devas dividi la sumon: 40 % por kotizo kaj 60 % por abono. Kiam estas la donaco, oni ne kalkulas la imposton. La situacio estas komplika. Kiam eksterlandano venas al Parizo kaj pagas kotizon, kiu iras tra la kaso, kiel pruvi ke tiuj kotizoj venas ekster Eŭropa komunumo. La tuto estas tre komplika.

K-do *Arturo Prent* konstatas kiel la PK kaj kasistino zorgas pri la tuto kaj dankas al ili pro tiu laboro.

K-do *Barkoviĉ* memorigas ke ekde venonta jaro niaj kotizoj aperos en eŭroj kaj ni proponas ke ekde nun ĉiuj kotizoj aperu en eŭroj.

Voĉdono pri la kasa raporto: por 49, kontraŭ 0, sindeteno 4.

Ĝenerala konsilantaro :

K-do *Jakvo Schram*, opinias ke en la komenco la Ĝ.K. bone funkciis kaj kiam alvenis la propono pri la kreo de la SAT-diskuto, li perdis la fadenon. Lia ideo pri Ĝ.K.-aro estas ne nur kontroli la laboron de la Plenum-Komitato, ĉar li fidas al la homoj kiuj laboras en la P.K. Unu el la taskoj de la Ĝ.K. povus esti diskuto pri tio, kiamaniere plifortigi kaj plibonigi SAT. Post la enkonduko de la SAT-diskutejo, la informoj de Ĝ.K. estis malpli oftaj, kaj la Ĝ.K.-aro malpli bone funkciis. Laŭ li, li mem ne estas sufiĉe kompetenta por roli kiel sekretario de Ĝ.K.-aro. Ĝ.K.-aro bezonas multe pli kleran, multe pli spertan kaj pli ruzan personon. Pro tio li petis la malŝarĝon de tiu tasko, kaj invitas ke iu bonvolu transpreni ĝin. (Neniu akceptas). Do, li akceptas tamen daŭrigi ĉar lia koro estas plene en SAT, estas preta tage kaj nokte labori por ĝi, sed postulas ke oni serioze traktu lian laboron.

K-do *Lutermano*, kiel membro de la Ĝ.K., opinias ke k-do Schram tre bone faras tiun laboron, kaj ne temas pri manko de kompetenteco. Li rimarkigas ke en la raporto de Ĝ.K., la PK faris siajn komentojn kaj skribas ke ekde la komenco la Ĝ.K. havas problemojn por funkcii. Nu, post la elektoj de la Ĝ.K.-oj, la P.K. tuj alelektis pliajn kamaradojn, kiuj kandidatiĝis tro malfrue sed mem ne kulpis pri tiu malfruo. Alelekto ne estas laŭstatuta. Verŝajne la intenco de la P.K. estis tute bona, sed kontraŭstatuta. Poste alvenis la unuaj raportoj de la kunvenoj de la P.K. en kiu estas skribita ke ĝi alelektis du pliajn kamaradojn, do entute kvar. Ankaŭ la dua fojo ne estis laŭstatuta. La tasko de la Ĝ.K. estas konsili la P.K. kaj ankaŭ kontroli ĉu ĝi agas laŭstatute. Do, la P.K. elektis sian propran kontrolanton. La kritiko estas bona kaj utila por SAT, ĉar ĝi helpas al la korekto de



Bonega etoso ĉirkaŭ la plena tablo

Fotis: F. Toubale

misfaroj kaj direktas la asocion al la bona vojo. Ĉu la Ĝ.K. diskutu gravajn problemojn pri la politiko de SAT? Laŭ li oni povas diskuti pri tio inter ĉiuj membroj en la SAT-diskutejo kaj poste la Ĝ.K. analizu la diskutojn kaj eltiru konkludojn per kiuj ĝi konsilu la P.K.-on.

Rilate al la publika letero de KEK en kiu la PK diskriminaciis parton de sia membraro (membrojn de la Komunista frakcio) postulante ke ili elektu inter diversaj ismoj, Ĝ.K. postulis ke oni senvalidigu tiun leteron, kaj la P.K. tion rifuzis. Tio estas ankaŭ kontraŭstatuta.

Fine, estas vero ke oni ne povas postuli ke ĉiu SAT-ano havu komputoron kaj retaliron, sed tio tamen ne malhelpas kandidati por iu ajn posteno, ĉar nun en ĉiuj urboj oni povas senpage sendi retmesaĝojn. Krome, se iu kandidato por la P.K. aŭ alia posteno vere ne havas eblecon, tiam ni decidu pri la solidareca ago kaj donacu al li malmultekostan komputoron. K-do Lutermano faras plurajn proponojn por la finkongresa Gvidrezolucio.

K-dino *Opulskiene* memorigas ke pri la elekto de Ĝenerala Konsilantaro oni tre multe parolis en la kongreso de Moskvo kaj tio aperis en la laŭvorta raporto. Do estus vere vane denove reveni al la sama afero.

K-do *Dies Krombeen* ne povas juĝi la kritikon al la P.K. sed laŭ SAT-Statuto, la nombro de Ĝ.K. ne estas sufiĉa ĉar ili devus esti laŭ la horzonoj. Do, teorie devus esti 24 kaj ĉiuj devus havi retaliron por rete komuniki.

K-do *Charlot* unue dankas al la sekretario de la Ĝ.K. kiu tute sincere kaj kelkfoje 24-hore okupiĝis pri la Konsilantaro. Por tiu posteno oni ne bezonas specialiston, fakulon sed sinceran kaj sindoneman homon. K-do *Schram* estas tiu persono. Pri la letero al IKEK: «Karaj gekamaradoj, mi kelkfoje riproĉas al niaj kamaradoj liberecanoj diri "la ŝtataj monstroj","la hispana milito". Mi ne volas dum 100 jaroj paroli pri tiu fifama letero de la P.K. Estas jam 5 jaroj. Mi preferus ke la PK nuligu tiun leteron, ĉar estis neniu damaĝo al la ricevuntoj, sed nur damaĝo al SAT. Sed la homoj eraras. Nu, necesas plurismo en ĉiuj instancoj de SAT, en la P.K. kaj en la Ĝ.K. Do Liberecanoj, komunistoj, verduloj, socialdemokratoj, demokratoj kaj maldekstraj kristanoj havu sian lokon en la P.K. kaj en la Ĝ.K. Se ni volas ke ree SAT iĝu La Laborista asocio en la laborista movado, necesas

kunlabori kun AVE, IKEK, TANEF, kaj aliaj progresemaj E-organizoj. Do, nun la krizo pasis kaj ni devas tiri lecionojn el ĉio kie oni povas eltiri. Tio signifas, pli da malsektemo, pli da volo iri antaŭen».

K-do *M. Hardy* nur atentigas ke eĉ kiam la P.K. de SAT estos internacia, la rolo de la Ĝ.K. estos same grava.

K-do *Barkoviĉ* reagas kiel simpla SAT-ano, al la diroj de k-do Lutermano. Pri la rimarko ke iu afero ne aperas en la nuna PK-raporto, temas pri la afero kiu okazis antaŭ la Moskva kongreso kaj la nuna raporto kovras periodon post la Moskva kongreso. Do estas normale ke tio ne aperas. Due, pri la publika letero al KEK: la tiama PK faris kaj subskribis ĝin. Pri ĝi oni parolis en la tiama raporto kaj tiu raporto estis aprobita en tiama kongreso. Do aŭtomate ankaŭ tiu ago de la PK estis aprobita. Neniam iu ajn en tiu momento riproĉis tion al la P.K. Nun post kelkaj jaroj oni revenas al ĝi. Trie, mi opinias ke nun ni estas en tiel malbona stato ke nia ĉefa zorgo devus esti ŝanĝi tion kaj plibonigi tiun staton anstataŭ disputaĉi pri la aferoj kiuj pasis. Mi ne vidas utilon en tio. Kvare, kiam oni diras ke ne estas laŭstatute alelekti iun, mi opinias ke tio estas harfendado, ĉar ĝuste, kiam mankas homoj por fari ion kaj kiam aperas kamaradoj kiuj ne ĝustatempe kandidatis sed estas pretaj labori, oni rifuzas ilin pro iu diabla regularo. Laŭ mi tio estas agado kontraŭ la interesoj de SAT. Kiam aperis tiuj du pliaj kandidatoj, por la PK estis tute normale alelekti ilin ĝis la venonta normala elekto kiam ili povos esti laŭregule elektitaj. Nun estas kvazaŭ krimo ke la PK akceptis (alelektis) tiujn du pliajn kamaradojn. Ĉu en la nuna situacio ni povas permesi al ni rifuzi iun kiu volas agi. Mi ripetas ke mi tion diris ne kiel PK-ano sed kiel simpla SAT-membro.

K-do *Ballaguy* opinias ke sufiĉas tiuj infanaĵoj. Oni disputas "pri la sekso de anĝeloj" dum la malamiko estas antaŭ la pordo. Malamikoj ne estas ene de SAT sed ekstere. La malamikoj estas novkapitalistoj.

K-do *Jesus de la Heras* miras ke oni diskutas pri diskuto. Dum parto de lia vivo li ne povis libere esprimiĝi en sia lando pro diktatoreco. Pro tio li abomenas la silentigon. SAT estas kultura asocio kaj eĉ diskuti pri la sekso de anĝeloj taŭgus ĉi tie. Do, se en SAT oni diros "ne parolu pri tio!", li tuj eksiĝos ĉar tio ne estas SAT kiel li imagis ĝin.

K-do *Marteno Bustin* opinias ke el la afero KEK oni devus eltiri lecionon kaj estonte agi pli korekte. Same li atentigas ke ofte aperas nocio "prezidanto de SAT". SAT ne havas prezidanton sed la Plenum-Komitaton kiu inter si elektas prezidanton. Do tion oni devus korekti.

K-do *Lutermano* opinias ke la afero pri letero al KEK estas simpla. Sufiĉas diri, ni nuligas ĝin. Li ne volas resti en la Asocio kiu diskriminacias lin. Do, se fine de la kongreso la letero ne estas nuligita, li kun granda bedaŭro kaj korŝiro eksiĝos el SAT pro la respekto al si mem.

K-do *Peyraut* klarigas ke kelkfoje dum la jaro, ekster la SAT medio, oni titolas lin «prezidanto de SAT». Li mem, ĉiam kiam eblas, korektas tion, sed oni ne povas enkarcerigi tiujn kiuj daŭre eraras pri tio. Pri ıa alelekteto de pliaj Ĝ.K.-anoj estis formala eraro. Sed estas la PK kiu puŝis ĉiujn kamaradojn dum la kongreso por ke ekzistu vere tiu Ĝ.K.-aro. Anonciĝis kelkaj por tiu formala periodo kaj tuj poste venis du aliaj. Tio estis miraklo ĉar finfine alvenis iuj kiuj volas labori. Do, oni ne laŭstatute alelektis ilin. Kaj pro tio la PK tute ne ruĝiĝas. Pri la afero de Publika letero, la tiama PK unuanime ĝin faris kaj subskribis kaj la aktuala ne nuligos ĝin de si mem. Se la kongreso volas fari ion en tiu senco, bone, sed ne estos la P.K. Li invitas la Ĝ.K. unue konsili al la P.K. kiel efektivigi ĉiujn taskojn kiuj estis en la opinienketo.

K-do *Arturo Prent*, kiel ĵus elektita ano de la Konfliktkomisiono esperas ke tiun konflikton oni povos solvi, sed se necesas bonvolu turni sin al la Konfliktkomisiono.

K-dino *Nora Caragea*, opinias ke se iuj gazetoj skribas pri la prezidanto de SAT, oni devus tuj korekti tion kaj tiel la eraroj ne ripetiĝos.

Per tio finiĝis la debato pri tiu punkto.

Sennacieca Revuo

K-do *Suarez* konstatas ke k-do Scherm faras kion li povas.

K-do *Barkoviĉ* informas ke la SR en la lastaj jaroj ne aperis regule. La lasta numero aperis por du jaroj kaj ankaŭ la venonta aperos por du jaroj. K-do Scherm, dum nia vizito survoje al Nagykanizsa, montris al ni preskaŭ pretan S.Revuon kiu principe devus aperi kun la aŭgust-septembra numero de Sennaciulo. Ni esperas ke ekde nun, kaj laŭ la promeso de k-do Scherm, ĝi denove aperos regule ĉiujare.

Eldonoj, librovendado

K-do *Pontnau* demandis kiam la nova PIV aperos.

K-do *Barkoviĉ* respondas ke ne eblas ankoraŭ diri precize. Daŭras la dua korektado de la presprovaĵo kiu estas jam enpaĝigita kun la ilustroj interne de la teksto. Kiam finiĝos tiu dua kontrolado, ni povos proksimume scii kiam ĝi aperos, ĉu fine de tiu ĉi jaro, ĉu venontjare. La PK petis kelkajn prezofertojn sed ĝis nun la plej taŭga alvenis de Kava-Pech en Ĉeĥio. Ni diskutos la aferon kun k-do Chrdle dum la kongreso en Zagrebo kie li partoprenos. Ĉiakaze la aperdato aperos ĝustatempe en Sennaciulo. Nun daŭras la antaŭmendo de nova PIV je prezo de 60 eŭroj por ekzemplero al kiu aldoniĝos la afranko. Ni ne konas ĝin ankoraŭ ĉar ĝi dependos de la tarifo valida en la momento de apero kaj de la pezo de la libro kaj de la lando al kiu oni ekspedas. Ni devas limigi ankaŭ tiun antaŭpagon, kiu ne povos daŭri ĝis la apero de la libro. Poste estos la normala vendoprezo.



Adiaŭa trinkado kun la urbestro de Nagykanizsa kaj bonvenigo al Alicante
Fotis: R. Bouchet

K-dino *Nora Caragea* demandas kial oni ne informas pri la antaŭpago en ĉiuj gazetoj kaj ne nur en gazetoj de SAT.

K-do *Yves Peyraut* respondas ke tiu ideo pri antaŭpago estis tre bona por la antaŭaj eldonoj de PIV ĉar SAT ne havis monon por eldoni ĝin. Kvankam SAT finance malbone fartas, ni pli-malpli scias kiom kostos tiu ĉi eldono. Pro tio la PK sukcesis meti flanken tiun necesan monon por la nuna eldono. Tio signifas ke tiu sistemo de antaŭpago fakte provokas ĉe SAT perdon de 10 eŭroj por ĉiu antaŭpagita PIV. Do antaŭmendantoj gajnas 10 eŭrojn sed SAT perdas 10 eŭrojn. Do li proponas ke oni decidu nun ĉesi tiun antaŭmendperiodon. Tiuj, kiuj ankoraŭ dum la kongreso volas antaŭmendi la libron kaj pagi ĝin, tion faru ĉar poste estos finita.

K-do *Jesus de las Heras* demandas, ĉu li povas ankoraŭ antaŭmendi kaj due ĉu kun la libro estos ankaŭ kompaktdiska versio de PIV, ĉar estos tre utila?

K-do *Barkoviĉ* respondas ke eventuale oni povus fari tion, sed tiam la prezo de la disko estus sama kiel tiu de la libro,

kaj oni povus elekti unu aŭ alian version (aŭ ambaŭ sed tiam oni pagus duoble).

K-do *Prevost* informas ke li proponis antaŭ du jaroj malpezan paperon por la nova eldono de PIV kaj ne ricevis respondon.

K-dino *Ana Montesinos* opinias ke oni povus ebligi al unuopuloj aĉeti malpli koste sed ne al libroservoj, kiuj poste revendas ĝin kaj gajnas per ĝi. Hispanaj vortaroj kiuj estas kun disko estas evidente pli kostaj ol tiuj sen disko.

K-dino *Nora Caragea* opinias ke por ne perdi monon oni povus nun plialtigi la prezon por la antaŭmendoj, sed publikigi tiun informon ekster la SAT-rondo.

K-do *Marteno Bustin* petas ke oni aperigu en Sennaciulo ke oni ĉesigas la antaŭmendperiodon.

K-do *Gilbert Ledon* ĝojas ke la antaŭmendo bone funkciis kaj havigis necesan monon por la eldono. Estas tute normale ke nun oni nuligu la antaŭmendon kaj atendu la aperon de la PIV. Ĉar li antaŭmendis dekon da libroj, li pretas pagi la plenan prezon por eviti la monperdon al SAT. Li petas ke oni rapidigu la eldonon.



Por danki al bona akcepto de la kongreso, la donaco al la urbestro estis «likvaĵo el Francio».

Fotis: R. Bouchet

Filatela servo

Nenia interveno.

Broŝurservo

K-do *Jakvo Schram* informas ke li ricevis leteron de Kribo en kiu li proponas al SAT aĉeti printilon por mem presi Sennacieca Revuon. La leteron li transdonos al la PK.

Amikeca Reto

K-dino *Nora Caragea* miras ke ĉi tie ne estas librosservo de SAT kaj ke la SAT-libroj ne estas aĉeteblaj.

K-do *Barkoviĉ* klarigas ke la ĉefaj SAT-eldonaĵoj estas aĉeteblaj en la koridoro.

K-dino *Ana Montesinos* demandas, ĉar ŝi ĵus aliĝis al SAT, kie ŝi povus trovi informojn pri la Amikeca reto, ĉar momente ŝi ne havas uzeblan komputoron kaj ne povas konsulti TTT-paĝojn.

K-do *Peyraut* respondas al ŝi ke ĉiujn adresojn ŝi povos trovi en la unuaj paĝoj de nia Adresaro.

SAT-Junulfako

K-do *Barkoviĉ* ... de la SAT-Junulfako kaj klarigas kie troviĝas ekz... lasta numero de la Juna Penso, kiuj estas je la disp... interesatoj.

K-do *Arturo Prent* demandas ĉu estas financa kialo ke la junuloj ne povis veni aŭ iu alia? Li deziras ke la PK esploru la eblecon por trovi rimedojn venigi junulojn kun subvencio se necesas.

K-do *Charlot*, klarigas ke k-do Vinko Markov ne povis veni pro okupo, sed ankaŭ pro financa problemo.

K-do *Prevost* proponas ke en ĉiuj kursoj oni sendu la adresojn de junuloj al la Junulfako.

SAT-Frakcioj

K-do *Renato Ballaguy* respondecas pri la «frakcio Pri distribua ekonomio». Antaŭe ĝi estis tre vigla. Nun tiu frakcio restas nur surpapere. Li invitas ĉiujn kiuj interesiĝas pri tio al la kunveno je la 5-a horo posttagmeze. Eblos aĉeti la broŝuron "La tria vojo".

K-do *Vincento Ch*... la laboro de frakcio estas ekster SAT por ven... La Komunista Frakcio ne havas rajton kaj ne volas havi la rajton por interveni en internaj aferoj de SAT.

K-do *Gary Mickle* informas pri la rekonstituiĝo de la Sennaciista frakcio. Li invitas al la kunveno morgaŭan tagon.

K-do *Suarez* bedaŭras ke estas tro malmultaj frakcioj, kaj bedaŭras la foreston de la Liberpensula frakcio.

K-do *Lutermano* informas ke malfermiĝis diskutlisto "sennaciismo" kaj ĉiuj kiuj interesiĝas bonvolu aliĝi.

Kongresoj

Venonta kongreso okazos en julio venontjare en Alicante, Hispanio, (01-08.07.2002).

Ni ricevis proponon de KCE en Svislando kongresi en la jaro 2003 en La Chaux-de-Fonds. K-do Lutermano subtenas la proponon ĉar la lasta konferenco de IKEK okazis tie kaj ĝi estis tre sukcesa. La problemo estas eventuale la prezoj de loĝado kaj manĝoj, kaj tion ni petos de organizantoj. Sed alia problemo estas la distancoj de diversaj lokoj kaj la tereno kiu estas malfacila por multaj aĝaj personoj.Oni devas grimpi kaj malgrimpi.

K-do *Arturo Prent* proponas lasi al la PK akcepton de tiu invito se la kondiĉoj taŭgas, kion ili devas esplori.

K-do *Jesuo de las Herras* opinias ke oni ne devas lasi al malmultaj personoj tiun decidon sed ke la kongreso devas decidi. La kongreso voĉdone decidas ke oni akceptu la proponon de k-do Prent kun unu kontraŭa voĉo.

K-do *Barkoviĉ* informas ke ni havas proponon por la jaro 2004 en Germanio en Neuburg am Donau. Kaj por la jaro 2005 oni unue pripensis kongresi en Bulonjo ĉe maro, ĉar estos centjariĝo de la unua U.K., sed eble ankaŭ UEA tion faros. Do, eble ni povus kongresi en Parizo, sed la demando estas ĉu estos sufiĉa intereso. Oni devus ankoraŭ pripensi.

K-do *Charlot* opinias ke por 2005 estas ankoraŭ tempo. Sed eble estus bone ke okazu preskaŭ sinsekve ambaŭ kongresoj samloke.

K-do *Peyraut* opinias ke sinsekva kongreso kun UK povus esti bona, sed ĉu vere por SAT Bulonjo ĉe maro estas taŭga? Jam okazis 4 kongresoj en tiu loko. Do estus bone ke niaj membroj donu sian opinion skribe, telefone aŭ rete al la SAT-ejo.

Oni voĉdonas pri la raporto de la P.K. Por aprobo de la raporto: 40 kaj por malaprobo 1 kun 5 sindetenoj. Do la raporto estas aprobita.

KVARA LABORKUNSIDO

Prezidas k-do *Arturo Prent*.

Dum la tuta kunsido oni traktis Deklaracion kaj Gvidrezolucion, kiuj finfine estis poluritaj kaj definitive akceptitaj. Ili ambaŭ aperis en la aŭgust-septembra numero de Sennaciulo.

Kompilis: G.O. kaj K.B.

La kutiman enhavon de Sennaciulo kun aktualaĵoj kaj aliaj kutimaj rubrikoj vi trovos en la venonta numero.